

LINGVO INTERNACIA

MONATA GAZETO POR LA LINGVO ESPERANTO.

ELDONATA DE LA KLUBO ESPERANTISTA EN UPPSALA.

Kosto de abono por jaro:

kronoj 3,00 = germ. markoj 3,30 = cendoj 75 15 öre = 15 pfenigoj = 20 centimoj =
= frankoj 4,25 = rejsoj 1000 = rubloj 1,50. 8 kopekoj — por daŭnpaĝa petitlinio.

Pago por anoncoj:

Adreso de la redakcio: *Klubo Esperantista, Uppsala, Sverige.* (Svedujo.)

III:a jaro.

Junio—Julio 1898. N:o 6—7 (30—31).

Al ĉiuj aŭtoroj kaj eldonantoj en Esperanto.

Ni petas, ke neniu aŭtoro de ia verko presu sur la verko ian numeron, ne demandinte antaŭe s-ro'n Zamenhof, ĉu tia numero estas ankoraŭ vakanta aŭ ĉu ĝi eble estas jam fordonita al ia alia baldaŭ aperonta verko.

La Red.

Esperanto kaj kongresoj internaciaj.

La Odesa Filio de la Societo "Espero", intencante klopodi por enkonduki la lingvon "Esperanto" en internaciajn kongresojn de la ekspozicio de 1900 en Parizo, interalie decidis sin turni al la prezidanto de la kongreso medicina, s-ro d-ro Lannelongue, kun la peto allasi nian lingvon por raporto kaj disputoj en la kongreso. Por la sukceso de tiu ĉi entrepreno estas antaŭ ĉio necesa pretigi la membrojn de la estonta kongreso por la aŭskultado de nia lingvo kaj parolado en ĝi. Tial la Komitato de la Odesa Filio decidis dissendi al la medicinaj societoj de l' tuta mondo, al la redakcioj de l' medicinaj ĵurnaloj kaj al apartaj personoj specialan alvokon (en du lingvoj: en la lingvo de la lando de la societo kaj en Esperanto) kaj inviton prijuĝi la proponon de la Komitato antaŭ la kongreso kaj vastigi la lingvon inter siaj membroj. Presante nun la tekston de la alvoko, la Komitato sin turnas al ĉiuj societoj esperantistaj kun la propono aliĝi al ĝia agado kaj de sia flanko akceli la sukceson de la entrepreno, kiu sendube havos grandan signifon por la vastiĝo de "Esperanto".

La alvoko.

De tiu tempo, kiam la latina lingvo perdis sian rolon de la internacia scienca lingvo, la diversnaciaj reprezentantoj de la scienco ne ĉesas renkonti longan vicon da grandaj malfacilaĵoj ĉe la uzado de la sciencaj laboroj de iliaj kunfratoj, apartenantaj al la aliaj nacioj. Tiuj ĉi malfacilaĵoj estas tiel

okulvideblaj, ke ne estas eĉ bezona nomi ilin detale: la malfacilaĵoj, renkontataj ĉe la tradukado de la diversaj sciencaj verkoj el unu nacia lingvo en la alian, estas konataj de ĉiuj. La grandega kvanto da tempo, kiun oni devas elspezi por la perfekta ellernado de tri aŭ kvar fremdaj lingvoj, estas ankaŭ pli-malpli juste taksata de ĉiuj. Sed oni povas konjekti, ke en la vasta rondo de la instruitaj homoj troviĝas tre malmultaj personoj, kiuj haltiĝis iam ajn antaŭ la demando pri tio, kiela kvanto da laboro, da tempo kaj mono estas elspezata kaj devas esti elspezata por traduki diversajn eminentajn verkojn kaj por eldoni ilin en diversaj lingvoj. Ankoraŭ pli malgranda nombro da personoj pensas pri tio, al kio devas fine konduki la pligrandiĝo kaj implikiĝo de tiu ĉi laboro, neeviteblaj ĉe la akre esprimiĝantaj en la lasta tempo naciaj tendencoj de la popoloj, loĝantaj la plej kulturan parton de la mondo.

La naciaj tendencoj tuŝis ĉiujn flankojn de la societa kaj kultura vivo de la popoloj, kaj la scienco — kiel ajn stranga tio ĉi ŝajnus ĉe la unua rigardo — ne evitis en tiu ĉi rilato la komunan sorton. Oni povas eĉ diri, ke la disvolviĝo de la scienca agado en ia lando fariĝas pli forta kaj pli fruktoporta precize de tiu momento, kiam disvolviĝas la nacia scienca lernejo kun difinita direkto de la komuna agado, kun pli-malpli severaj tradicioj, kun la posteuleco kaj konsekvenca disvolviĝo de la kreanta agado de l' homa spirito.

Kaj ju pli progresos la tendenco de l' apartigado de la popolaj grupoj, des pli kaj pli granda fariĝos la nombro de la naciaj sciencaj lernejoj kun iliaj karakteraj apartecoj.

Sed kiel ajn dividiĝus kaj multiĝus sciencaj lernejoj, la scienco mem neniam ĉesas esti tio, kio ĝi estas laŭ ĝia esenco: — propraĵo de ĉiuj homoj, de la tuta instruita kultura mondo.

Tio ĉi estas sentata kaj konsciata ne sole de la reprezentantoj de la scienco, sed de ĉiuj kleraj homoj. Kaj en la rolo de l' kreantoj, gvidantoj kaj inspirantoj de la naciaj sciencaj lernejoj aperas ĉiam nur tiuj veraj reprezentantoj de la scienco, por kiuj ĝi estas atingebla en tuta ĝia amplekso, nedepende de la malvastaj kadroj de l' nacieco kaj lingvo. Kaj jen apud la kreskado kaj fortikiĝo de la naciaj sciencaj lernejoj aperas la tendenco de ilia proksimiĝado, de la reciproka interŝanĝo per novaj eltrovoj kaj almitaĵoj en la regiono de l' spirita agado. Unu el la plej helaj kaj plej karakteraj esprimoj de tiu ĉi tendenco estas la internaciaj sciencaj kongresoj.

La medicina scienco en tiu ĉi rilato preskaŭ ĉiam iris antaŭ la aliaj branĉoj de la scienco. La internaciaj medicinaj kongresoj kunigas plej multe da diversnaciaj reprezentantoj de la scienco, estas aranĝataj pli ofte ol aliaj kaj plej forte altiras al si la atenton de la societo. La senĉesa kreskado de l' nombro da membroj de tiuj ĉi kongresoj, la konstanta disvastiĝo de la programoj de ilia agado, — tio ĉi sufiĉe pravas, ke tielaj kongresoj fariĝis jam konstantaj kaj necesaj aperoj en la regiono de la scienca agado.

Sed ju pli vasta fariĝas la rondo de l' membroj kaj la programo de la agado de l' internaciaj kongresoj, ju pli ili proksimiĝas al la atingado de iliaj idealaj celoj, des pli kaj pli forte estas sentata kaj konsciata unu esenca malhelpaĵo sur ilia vojo. Tiu ĉi malhelpaĵo estas la diverslingveco. Jam nun en tiuj ĉi kongresoj estas farataj raportoj kaj komunikiĝoj, kaj la disputoj estas kondukataj en tri-kvar lingvoj, ĉe kio tre ofte okazas, ke al la raportanto, faranta komunikiĝon en la franca lingvo, du oponentoj rediras angle kaj germane. Kaj ĉu estas ebla kalkuli, kiu el la alestantoj ne komprenas alterne jen la raportanton, jen unu aŭ alian el la oponentoj?

Ju pli da membroj altirados tiuj ĉi kongresoj, des pli grandiĝos kaj fortikiĝos similaj neoportunaĵoj kaj des pli kreskos en la konvinko de la partoprenantoj de tiu ĉi fruktoporta afero la malgaja konvinko, ke multe el ilia komuna laboro vane perdiĝas por multaj iliaj kolegoj kaj ke el la malŝparataj penoj kaj energio naskiĝus multe pli fruktoportaj rezultatoj, se ne estus sur la vojo la neevitebla diverslingveco.

La internacia familio de la medicina scienco kreskas kaj vastiĝas; ne parolante jam pri italoj, hispanoj, svedoj, norvegoj, danoj, bohemoj, serboj kaj bulgarioj, — eĉ la turkoj kaj japanoj iom post iom eniras en ĝian konsiston. Kaj ĉiu konstanta komitato de la internaciaj kongresoj devas nur ĝoji je tiela vastiĝo, ĉiu vera reprezentanto de la scienco povas nur deziri rapidan kaj plenan disvolviĝon al ia nova naskiĝanta nacia scienca lernejo. Vidante tielan perspektivon oni nevole devas demandi sin: kio do estos, kiam la reprezentantoj de tiuj ĉi naskiĝantaj lernejoj, sekvante la vojon de la plej grandaj eŭropaj nacioj, faros ilian patrolingvon sola lingvo de ilia lernejo kaj poste aperos kiel plenrajtaj membroj de la internaciaj kongresoj?

Oni povas antaŭvidi la malfacilan dilemon, antaŭ kiu neeviteble staros la komitato de ĉiu internacia kongreso. De unu flanko, dezirante atingi la idealajn celojn de similaj kongresoj, — la altiradon de la plej multaj membroj kaj la vastigadon de la programo de agado, — oni devos allasi la plej grandan nombron da lingvoj por raportoj kaj disputoj. De alia flanko, celante la plej grandan fruktoportecon de la rezultatoj kaj la plej plenan atingeblecon de la komuna laboro por ĉiuj membroj, estos necesa elektadi nur du-tri plej konatajn lingvojn.

Kiel helega praktika jesigo de tiuj ĉi konsideroj servas la lastaj internaciaj medicinaj kongresoj kaj speciale la plej granda el ili — la moskva kongreso. Ĉiuj kredeble memoras, kiel la Komitato de tiu ĉi kongreso, sub la influo de persistaj praktikaj postuloj devis iom post iom forlasi la unue notitan celon: la eblan unuigon de la oficiala lingvo de l' kongreso. — kaj iom post iom ankaŭ oficiale konsenti la saman diverslingvecon, kiu regis en la antaŭaj kongresoj.

La eliro el tiu ĉi situacio devas esti trovita kaj la esenco de tiu ĉi eliro estas klara por ĉiuj: por la kuna komuna laboro de la reprezentantoj de diversaj nacioj devas ekzisti komuna lingvo. Estas dubebla, ke tiu ĉi tezo povu esti pridisputata en principo; la disputojn, nekonsentojn kaj kontraŭdirojn povas eksciti nur ĝia praktika solvo, se oni provos elekti unu el la ekzistantaj naciaj lingvoj.

Efektive, tiela solvo de tiu ĉi demando prezentas preskaŭ nevenkeblajn malfacilaĵojn. La patrolingvo estas kara por ĉiuj kaj ĉiu; ĉia el la ekzistantaj naciaj lingvoj, prijuĝata kiel ilo por internaciaj komunikiĝoj, havas multe da bonaj kaj malbonaj ecoj. Estas dubebla, ke oni povu krei ian instituton, sufiĉe kompetentan kaj aŭtoritatan por senpartie taksii tiujn ĉi ecojn de l' lingvoj. Eĉ la statistikaj sciigoj pri la vastiĝeco de ĉiu el la ekzistantaj lingvoj estas ĝis tia grado neprecizaj kaj problemaj, ke ili tute ne povas servi kiel fundamento por elekto de unu el la lingvoj. Kaj kune kun tiuj ĉi esencaj malfacilaĵoj aperas unu lasta — eble la plej nefondita kaj malgaja laŭ la esenco, sed sendube la plej forta kaj potenca en la afero de la praktika solvo de la demando: tio ĉi estas la nacia memamo. Kaj en tiu ĉi rilato la lasta moskva internacia kongreso kaj la energia akra protesto de la anglaj kuracistoj kontraŭ la forigo de ilia lingvo el la nombro da oficialaj lingvoj de l'

kongreso — ankaŭ servas kiel helega praktika ekzemplo kaj inspiranta averto por la estonteco.

Sed se oni konjektos eĉ la preskaŭ neblaĵojn: la eblecon de la internacia konsento pri tiu ĉi afero, la eblecon, ke oni elektos unu el la ekzistantaj naciaj lingvoj kiel la solan oficialan lingvon de la internaciaj kongresoj, — kio garantias, ke tiun ĉi decidon akceptos ĉiuj personoj, kiujn interesas la demando? Ni konjektu tamen ankoraŭ unu nekredeblaĵon: ni supozu, ke la personoj, akceptintaj la decidon, faras la plimulton, kaj ke tiu ĉi fakto estas iel pruvita; — kiu havos tiam sufiĉan aŭtoritaton por difini la signifon de la malplimulto, kiu ne akceptis la lingvon, por la scienco kaj taksu la perdojn, kaŭzitajn de la forigo de tiu ĉi malplimulto de la komuna laboro? Kaj kio do estos fine, se tiu ĉi malplimulto kreskos kaj en la daŭro de kelkaj jaroj fariĝos plimulto?

Oni povas diri eĉ pli: simila decido malproksimigus de la komuna laboro la multegon da homoj, kiuj principe nenion havus kontraŭ la akcepto de ia lingvo elektita, se ili nur sciis ĝin. Ellerni fremdan lingvon kun tiela perfekteco, ke oni povu fari en ĝi raportojn, kontraŭdirojn kaj partopreni en la vivigitaj disputoj — tio ĉi estas afero tute ne facila, postulanta malŝparon de la laboro kaj tempo kaj atingebla tute ne por ĉiu homo. Kiu kalkulos la personojn, kiuj nenion havas kontraŭ principa elekto de unu sola lingvo, kiuj povus kaj dezirus multon enporti en la komunan trezorejon de la kuna laborado, sed ne havas la eblon fari ĝin nur danke al la okaza nescio de la lingvo elektita?

Oni devas fine noti, ke, kreante tiom da malfacilaĵoj por la nuna tempo, la elekto de unu el la naciaj lingvoj promesas nenion firman por la estontaj generacioj. Oni ne povas esperi, ke tiela elekto devigos ĉiujn scienculojn de ia lando lerni nome tiun ĉi fremdan lingvon. La vastiĝo de la sciado de iu fremda lingvo, ĝia penetro en la fremdan landon dependas de multaj tre implikitaj kaj malfacile kapteblaj kaŭzoj; la akcepto de unu el la lingvoj, kiel komunan internacian lingvon de la sciencaj kongresoj eniras en la nombron de tiuj ĉi kaŭzoj eble eĉ kiel sufiĉe forta aganto; sed tiu ĉi sola fakto per si mem estas ankoraŭ senforta kaj ne povas enkonduki la scion de l' lingvo en diversajn landojn, estantajn en diversaj politikaj, ekonomiaj kaj kulturaj kondiĉoj. Kaj la alvoko de la agantoj de l' scienco difiniĝas nur en la aĝo matura, kiam oni ne havas jam tempon por komenci la ĉiuf flankan lernadon de l' fremda lingvo. La plejmulto de la reprezentantoj de la scienco, se ili ne ellernis la elektitan lingvon en frua aĝo danke al la reganta en ilia lando kutimo, neniam ellernos ĝin, se eĉ ĝi estos elektita kiel oficiala lingvo de la internaciaj kongresoj. Kaj la fortikiĝo de la ellernado de ia lingvo en ia lando postulas tempon, ŝanĝon de unu-du generacioj: kiu do povas garantii, ke daŭre tiu ĉi tempo, sub la influo de politikaj kaŭzoj aŭ de okaza multeco de la personoj de iu nacio, la elektita lingvo mem ne estos ŝanĝita?

Sekve la elekto de lingvo nacia por la kongresoj internaciaj 1) estas tre malmulte kredebla, 2) promesas kaŭzi tre signifan kaj malfacile takseblan malprofiton al la celoj mem de la kongresoj kaj al ilia signifo por la scienco, kaj 3) tute ne garantias tielan vastiĝon de la elektita lingvo, kiela farus ĝin efektive internacian.

Ĉe similaj kondiĉoj aperas mem la alia decido de la demando: — la elekto por tiu ĉi celo de neŭtrala lingvo arte kreita, facile ellernebla, atin-

gebla por la plejmulto de homoj instruitaj kaj plene kapabligita por la buŝa kaj skriba parolo.

La ideo de simila lingvo okupis en diversaj formoj multajn grandajn saĝojn. Tie ĉi ne estas loko por rakonti la historion de la disvolviĝo de tiu ĉi ideo. Estas sufiĉa nur diri, ke inter la personoj sin okupintaj je ĝi oni povas memori tielajn nomojn, kiel Descartes, Leibniz, Locke, Wilkins, Grimm, Max Müller. Komencante de la XVII-a centjaro, daŭre preskaŭ 250 jaroj tiu ĉi ideo vivas ne mortante kaj per granda vico da laboroj de pli modestaj scienculoj kaj praktikaj agantoj ĝi en nia tempo estas jam elkondukita sur la veran vojon.

La arta lingvo, ĝis strangeco facile ellernebla, en plej granda grado kapabligita por la internaciaj komunikiĝoj, praktike provita por skriba kaj buŝa parolo, havanta eĉ malgrandan literaturon, ekzistas kaj vivas, kvankam ĝia ekzistado, bedaŭrinde, estas konata de tre limigita rondo de l' homoj. Tio ĉi estas la lingvo "Esperanto", kreita de rusa kuracisto, d-ro Ludovik Zamenhof kaj aprobita de tielaj personoj, kiel la glora oksforda profesoro Max Müller kaj la verkisto grafo Lev Tolstoj, kaj de tiel kompetenta instituto, kiel la speciale elektita komisiono de la Amerika Filozofa Societo en Philadelphia.

Por la internaciaj medicinaj kongresoj tiu ĉi lingvo estas netaksebla ilo kaj ĝia elekto kiel komunan lingvon por tiuj kongresoj promesas, sendube, forigi la sennombrajn neoportunaĵojn, kunligitajn kun la diverslingveco, ne minacante per ia el la malgajaj kaj danĝeraj sekvoj, al kiuj povas konduki la elekto de unu el la vivantaj naciaj lingvoj.

Por la plena kaj perfekta ellernado de tiu ĉi lingvo sufiĉas unu-dusemajna laboro kaj du-tritaga praktikado, precipe por la personoj, havantaj eĉ tre neprofundan konatecon kun unu-du el la novaj aŭ malnovaj eŭropaj lingvoj. Ĝia plej plena neŭtraleco, ĝia malvasta kunligo kun la plejmulto da vivantaj lingvoj, la specialecoj de ĝia konstruo, farantaj la streĉon de la memoro preskaŭ nebezona, la simplaj, spritaj kaj en la plej granda grado facile ellerneblaj reguloj de ĝia uzado, grandega libero en la vortofarado, la mirinda precizeco de la esprimado de l' pensoj kun la plena potenco de la severa logiko en la sintaksa parto de ĝia gramatiko — ĉio tio ĉi donas al ĝi sennombrajn preferojn antaŭ la vivantaj lingvoj en ĉiuj internaciaj kongresoj.

Jen kial la Komitato de la Odesa Filio de la Societo "Espero", kiu kune kun la aliaj societoj kaj kluboj havas la celon vastigadi tiun ĉi lingvon, decidis preni la iniciativon en la afero de la enkonduko de tiu ĉi lingvo en medicinajn kongresojn.

La Komitato de la Filio ne kaŝas de si, ke en nuna tempo la akcepto de simila lingvo kiel unu sola oficiala lingvo de la internaciaj kongresoj povas renkonti multe da malfacilaĵoj, ke la antaŭjuĝoj kaj nekonfido je ĉiu nova iniciativo povas krei multe da malhelpaĵoj por la tiela solvo de tiu ĉi demando.

Konsciante tion ĉi, la Komitato decidis por la unua fojo peti la Organizantan Komitaton de la estonta pariza medicina kongreso de la jaro 1900 pri la allaso de la raportoj kaj disputoj en la internacia lingvo "Esperanto" egale kun tiuj naciaj lingvoj, kiuj estos allasataj en tiu ĉi kongreso.

Nur la unua paŝo estas malfacila. Kiam simila lingvo estos allasita, ĝiaj preferoj montros sin mem kaj neeviteble alkondukos al la elekto de tiu ĉi lingvo kiel oficiala lingvo de la internaciaj kongresoj. Sed por la sukceso de la afero estas necesa, ke la membroj de la estonta kongreso estu almenaŭ

malmulte pretigitaj por la aŭskultado kaj komprenado de la raportoj en tiu ĉi lingvo, kaj ke la peto de la Komitato de la Odesa Filio de la Societo "Espero" ne restu sola.

Tial la Komitato turnas sin al la medicinaj societoj de tuta la mondo kun la propono subteni ĝian peton antaŭ la Organizanta Komitato de la estonta pariza medicina kongreso kaj kune helpi al la vastigado de la konatiĝo kun la lingvo internacia inter iliaj membroj.

La tempo kaj la laboro, necesaj por ellerni la lingvon "Esperanto" estas tiel sensignifaj, la konatiĝo mem kun ĝia sistemo prezentas tiom da intereso por ĉiu homo instruita, ke oni ne povas dubi la sukceson de tiu ĉi lingvo inter la membroj de l' medicinaj societoj, precipe se oni memoros tiajn sen-nombrajn profitojn kaj oportunaĵojn, kiujn promesas la elekto de tiu ĉi lingvo kiel komunan lingvon por la internaciaj komunikiĝoj, kaj la grandecon de la ideo, promesanta per unu fojo forigi por ĉiam la diverslingvecon, tiom forte dividantan la reprezentantojn de l' diversaj nacioj.

La medicina scienco troviĝas en escepte favoraj kondiĉoj por fariĝi unu el la vivaj kaj agemaj kondukantoj de simila ideo en la homaron. Ĝia terminologio estas tute internacia kaj povus esti preskaŭ sensanĝe transportita en la lingvon "Esperanto". La prezentantoj de la medicino ĉiutage renkontas multegon da homoj kaj ĝuas enviindan aŭtoritaton en la societo. Ilia voĉo, ilia helpo en la simila demando havas grandegan signifon. La alvoko mem de la kuracisto devigas lin fordoni sin al la servado al la homaro. La kuracistoj jam ne unu fojon aperadis kiel kondukantoj, per kies helpo eniradis kaj disvastiĝadis en la societo diversaj grandaj ideoj kaj la veroj de l' scienco. Kaj al la prezentantoj de tiela scienco pleje decas aperi en la rolo de la iniciatoroj en la praktika efektivigo de tiu grandega ideo, de kiu estis gvidataj la kreintoj kaj la vastigintoj de la lingvo internacia.

La Komitato de la Odesa Filio de la Societo "Espero" estas profunde konvinkita, ke la medicinaj societoj ankaŭ nun ne rifuzos subteni tiun ĉi aferon, meti ĝin al la trarigardo kaj prijuĝo en iliaj kunvenoj kaj vastigi la sciigojn pri tiu ĉi lingvo inter siaj membroj.

Novaĵoj.

Donacoj.

S-ro la abato *I. Solis*, en S:t Hyacinthe, Kanadujo, donacis por la "Kapitalo de d-ro Zamenhof": 5 fr. = 3:50 kr.; por efektivigo de la propono de s-ro Grünfeld: 2:50 fr. = 1:75 kr. — S-ro *G. Iljin* donacis por "la filinoj de la esperantistaro": 25 kop., por ilustrado de nia gazeto: 25 kop.

S-ro *A. Zinoviev* petas sciigi, ke 10 rubl. — lia promesŭldo al la eldono de Jubilea Jarlibro — estas pagitaj per li poŝte al s-ro V. Ŝmurlo en Tomsk, 13. III. 1898.

* * *

La Ekzercaro.

La grava verko de d-ro L. Zamenhof, "Ekzercaro de la lingvo internacia Esperanto" estas nun publikigita en nova eldono, tute simila al la unua, kiu estis nericevebla dum kelke da tempo. Tiu ĉi verko, la plej bona kaj

bezona por la komencantoj, estas tro bone konata de ĉiuj, por ke ni bezonus eĉ rekomendi ĝin. En la fino ĝi enhavas plenan nomaron de la ĝisnunaj verkoj de la esperanta literaturo ankoraŭ riceveblaj.

* * *

Internacia anoncado.

“Internacia Kostotabelo de E. Arduin, proprajulo de vinberejoj kaj negocisto, 11 Rue Turenne, Bordeaux“ estas anonca folieto, presita en Reims en la presejo de l' gazeto *L'Espérantiste*. S-ro Arduin, kiu multe anoncis pri siaj vinoj en nia gazeto, sciigis nin pri sia intenco doni $\frac{1}{2}$ % de la mendoj, kiujn li ricevos danke al la lingvo Esperanto: $\frac{1}{4}$ % al la bontrovo de D-ro Zamenhof kaj $\frac{1}{4}$ % al la bontrovo de la gazeto L. I.

* * *

Pri Esperanto parolis: La franca humorista gazeto “*Le Pêle-Mêle*“, eldonata en Parizo, N:o 24, la 12 junio, komencas sian tekston per kroniko, titolita: “La lingvo internacia.“ La aŭtoro, kiu sin nomas *Fred Isly*, diras interalie:

“Mi sekvas kun intereso la provojn de la lingvistoj penantaj fondi novajn lingvojn artajn. Ekzistas unu tiela, por kiu bravaj penadoj estas farataj en tiu ĉi momento. Tiu ĉi lingvo, al kiu ĝia aŭtoro, d-ro L. Zamenhof, donis la nomon *Esperanto*, kolektis multe da adeptoj en la mondo kaj en Francujo notinde, kie s-ro L. de Beaufront faris sin ĝia enkondukinto kaj propagandanto.

Esperanto estas ĉiom inda elvoki la entuziasmon de l' partianoj de lingvo universala. Ĝi estas fondita kun zorgado pri la internacieco, tio signifas, ke ĝi posedas la ecojn fundamentajn de lingvo, difinita por esti parolata de unu fino ĝis la alia de l' mondo: *la facilecon de elparolado kaj la simplecon gramatikan*. La fervoro de la esperantistoj estas granda kaj ilia batalado estas kondukata kun multe da kuraĝo. Ili ekhavis la bonan ideon fondi gazeton por akceli la propagandon kaj esti ligilo inter ili.

Ĉu ili prosperos? Eble. Ha, mi scias ja, ke simila provo estis farita jam por la Volapük, ke ankaŭ ĝi ĉe sia komenca aperado ĝuis taggloron sufiĉe grandan (“*une vogue assez grande*“), kaj ke ĝi estis fine forgesita kaj lasita tute. Ĉu oni devas konkludi, ke tiel same rilatos Esperanto? Jes kaj ne. Tio dependas de la esperantistoj mem.

Kaj por diri al ili sincere mian opinion pri tiu ĉi koncerno, por tio mi aligas nun denove la demandon de la lingvo internacia.“ La verkinto finas sian kronikon petante la permeson studii en ia venonta artikolo “la punkton delikatan: la estonteco de Esperanto“.

En komparo kun tiu ĉi supra artikolo simpatia de ŝercisto ni ne povas rifuzi al ni la plezuron citi ian mortokrion el la tombo nefermita de niaj grandfrazaj kontraŭuloj. En unu numero de ia sveda gazeto — ni supozas, ne sen kaŭzo, ke en “*Göteborgs Aftonblad*“: ni ricevis la reskribon de unu amiko, kiu siavice ricevis nur detranĉaĵon el la numero — aperis la artikolo sekvanta:

“Tie ĉi en Göteborg fondiĝis en tiuj ĉi tagoj societo por ia tiel nomata mondlingvo: Esperanto. Jam la nomo memorigas je certa grado pri spiritista humbugo kaj *miss Esperance*. Kaj cetero, por kio ni havus ian kvaran, en la supobolejo de iu freneziginta cerbo lingvista kumbolitan “internacional-galimatias-lingvon“, kiam ni jam havas tri plene uzeblajn kaj, krom tio, vivantajn mondlingvojn: angla, germana kaj franca. Por aĝaj fraŭlinoj kun modestaj postuloj al la vivo kaj kiuj malgraŭ tre pena studiego ne povis ellerni sufiĉe iun el la tri efektivaj mondlingvoj, povas ja esti tre agrabla amuzado vespera ekzercadi siajn buŝangulojn je “mondlingvo“, kiun komprenas neniu. Cetero, el kia mondo venas tiu nova lingvo? Ĉu el Saturno aŭ Urano?“

Ni bedaŭras ĉiujn suferantajn de malsana stomako, sekve ankaŭ la verkinton de tiu ĉi literatura juvelo. Sed kial do ne turni sin en oportuna tempo al ia kuracisto!

La maja numero de *O Philatelisto do Occidente* enhavas noton pri novaj portugalaj poŝtmarkoj verkitan en portugala lingvo kun Esperanta traduko.

Le Petit Bleu en Bruselo kaj *Pietierburgskaja Gazeta* en Peterburgo agadas, ĉiu en sia loko, konstante por la progreso de nia lingvo. N:o 133 de la lasta (29 majo) enhavas daŭrigan artikolon de s-ro K. Ostanieviĉ — gramatikajn, tekston, informojn k. c.



Rilate leteron de A. Z.


(rig. Febr. 1898).

Mi tute konsentas kun A. Z., ke estas tre dezirinda fari "Lingvo Int." dusemajnan kaj altiri legantojn al pli viva interŝanĝo per problemoj, konkursoj k. t. p. Sed kun la intenco forigi el "L. I." literaturajn artikolojn, versaĵojn kaj novaĵojn neesperantajn — mi ne povas konsenti: 1) Mallarĝa speciala enhavo de "L. I." farus nian ĉefan organon ne interesa por novaj adeptoj, kiuj ĉiam en komenco de ilia ellernado esperanton ne tralegas ĉion en la gazeto, sed elektas tion, kio speciale ilin interesas; ekzemple unu el miaj konatoj dum longe preskaŭ ne legadis ricevaditajn numerojn de "L. I." ĝis tempo kiam li trovis en la gazeto la artikolon pri "Nova Kaledonio"; traleginte ĝin li jam nun bone kaj kun plezuro legas ĉion skribitan en esperanto.

2) Literaturaj artikoloj estas interesaj preskaŭ al ĉiuj, kaj krom tio ĉi en ili iom post iom ellaboriĝas la plej kompreneblaj, oportunaj kaj pentrajaj vortoj kaj frazturnoj. Kompreneble "L. I." ne devu ankaŭ turniĝi en literaturan ĵurnalon, kies rolon decus plenumadi al "Biblioteko". *A propos* *) ĉu niaj odesaj amikoj ne povas transformigi "Bibliotekon" en monatan literaturan ĵurnalon; krom tio ĉi estas tre dezirinde havi kvankam unu ilustritan esperantan eldonon.

Mi eksciis, ke nia estimata amiko V. Langlet, volas eldoni siajn esperantajn vojaĝojn en sveda lingvo. La libro enhavos pentraĵojn. Li konsentas eldoni ĝin ankaŭ en esperanto, se troviĝos 300 aĉetantoj. Ĉu ne troviĝos dezirantaj? Mi promesas aĉeti 10 ekz.

F. Postnikov.




Internaciaj vojaĝoj.

En 1900 jaro mi intencas esti en Pariza Tutmonda Ekspozicio. Laŭ vojo mi volus konatiĝi kun germanaj, belgaj kaj francaj esperantistoj. Se tempo permesos al mi, dum returna vojo, mi vizitos Italujon kaj Aŭstrujon (eble ankaŭ Hispanujon). Se iu ajn esperantisto dezirus helpi al mi en nekonata lando aŭ simple konatiĝi kun mi, mi humile petas jam nun skribi al mi, por ke mi povu pripensi kaj kondiĉigi pri loko kaj tempo.

Adreso: Rusujo. S. Petersburg. Inĝeniernaja Akademia.

F. Postnikov.



La kara nomo.

Nomon mi vian sur sablo skribadis.
Sed kovrita ĝi estis per ventoj;
Tiam sur arboj mi ĝin eltranĉadis,
Sed la ŝeloj rekreskis sur arboj.

Nomon sur ondoj eĉ mi desegnadis,
Forportita ĝi estis per fluoj;
Mi ĝin ankoraŭ sur vitroj pentradis,
Sed la vitrojn disbatis la ventoj.

Nomon enskribis en koron mi tiam.
Enskribita en koro ĝi restos;
Tie ĝi estas kaj restos por ĉiam.
Ĝis la koro en mi ne pli batos.

K.

*) Mi pensas ke ĉiun ne esperantan vorton oni devas presi per aliaj leteroj.

Bibliografio.

A lingua universal "Esperanto". *Methodo completo comprehendendo dois vocabularios segundo a edição franceza de Mr. L. de Beaufront, traduzido e coordenado por Manuel Ribeiro da Costa e Almeida (Medico-cirurgião). Gourecia, 1898. Preço: 200 reis.*

Bona lernolibro estas unua kaj ĉefa kondiĉo por rapida progreso kaj firma sukceso de nia lingvo en ia ajn lando. Bedaŭrinde nur tre malmultaj popoloj havas bonajn lernilojn kaj pli-malpli detalajn vortarojn de Esperanto. La plej detala gramatiko de s-ro Meier jam ne ekzistas en vendo, la rusoj havas tre bonajn vortarojn kaj mallongan gramatikon, la angloj havas nun nek vortaron nek gramatikon. La plej feliĉaj estas ŝajne la svedoj danke al la verkoj de s-roj Henrichundqvist, Backman, Jonsson, Langlet, Nylén kaj aliaj. Des pli agrable estas por ni saluti la aperon de nova kaj tre bona lernolibro de "Esperanto" por portugaloj, verkita de s-ro Costa e Almeida. Ni ne dubas, ke tiu ĉi libreto rapide kondukos antaŭen nian lingvon laŭ la vojo de progreso en Portugalujo.

La ĉefa malfacileco en la ellernado de "Esperanto" estas nek la mirinde simpla gramatiko, nek la mirinde oportuna vortaro, sed la specialecoj de l' patra lingvo, kiujn ne ĉiuj scias plene eviti eĉ sperta esperantisto nur tial, ke li ne rimarkas ilin. Tial, ŝajnas al ni, Esperanto estas pli malfacila por germano, kies parolo havas tute specialan konstruon, ol por la franco, parolanta preskaŭ internacie. Oni tial nepre devas en ĉiu nacia lernolibro montri la ĉefajn specialecojn de l' patra lingvo kaj la rimedojn eviti ilin en la lingvo internacia. La bela ekzemplo de simila lernolibro estas la franca "Manuel Complet" de s-ro L. de Beaufront, precipe la vortaro franca-esperanta. Elektinte tiun ĉi libron kiel modelon por la portugala lernolibro, s-ro Costa e Almeida multe faciligis la uzadon de nia lingvo por portugaloj. La vortaroj esperanta-portugala kaj portugala-esperanta estas sufiĉe detalaj kaj tre zorge prilaboritaj. La lernolibro de s-ro Costa e Almeida enhavas antaŭparolon, la versaĵon "Defalinta folio" (la francan prototipon de Arnault, la esperantan tradukon de la aŭtoro, kaj la portugalan — de João de Deus), la gramatikon, ekondukon en la vortaron kaj la ambaŭ vortarojn. Tre utila estas ankaŭ la aldono de la aŭtoro pri la verbo en la lingvo Esperanto, kie en mallongaj klaraj reguloj la aŭtoro lernigas traduki en Esperanton ĉiujn formojn de l' verbo portugala kaj kune konatigas la leganton kun riĉeco kaj simpleco de l' esperanta konjugacio. Laŭ nia opinio estus utila aldoni al la libreto iom pli da teksto esperanta (krom la antaŭparolo, presita en du lingvoj, kaj la nomita versaĵo la libro ne enhavas ĝin) por doni al ĉiu komencanto materialon facile legeblan kaj tiamaniere ilustru la gramatikon, sed ni ne havas la rajton riproĉi la aŭtoron por tio, kion li *ne faris*, kaj ĉio, kion li faris, estas farita tre bone. La malgranda kosto de la libro faciligos ĝian vastiĝon.

Iru, libreto, en la mondon kaj akiru amikojn de l' lingvo internacia.

V. G.

El Lermontov.

Tiel adiaŭ!... Ho vorto severa!
 Nur kvin literoj, sed prenas jam ĉion:
 naskis*) en koro doloro infera,
 kaj de feliĉo restigis nenion.
 Rigardas okuloj vin, ho mia ĝojo...
 kaj — kiu scias? — je lasta jam fojo.

S. S.


Noto. Mi petis la redaktoron lokigi tiun ĉi verseton, kia ajn estu lia opinio pri ĝia indeco, pro tiu notinda motivo: Ĝia aŭtoro, s-rino S. S., tre juna fraŭlino rusa, ricevis de mi kelkajn lernolibretojn, broŝurojn kaj verketojn Esperantajn, kun la "vortaro universala". Ŝi ricevis ilin je 7 horoj, kaj 3 horoj poste, je 10, ŝi jam skribis al mi tiun ĉi tradukon de verseto de Lermontov.

*) Devas esti: naskiĝis.

Kvankam oni devas konfesi, ke la dirita persono posedas sendispute talenton tre neordinaran en ujo de parolo, kaj verkas kun estrema facileco tre belajn versojn en ruse; kvankam — mi devas ankaŭ konfesi — ŝi faris pro nekutimo tri erarojn (manko de la *n* akuzativa, kaj duobla neigo, korektitajn per mi sen tuŝo al rimoj), tamen mi opinias tiun ĉi ekzemplon ege montrinda al la mondo esperantista, kaj multege karaktera.

Mi petas eĉ personojn kaj jurnalajn favorajn al lingvo mondeinterŝanĝebla rimarkigi, kie oni povas, tiun ĉi notindan faron kiun mi atestas kiel tute vera.

A. Z.



El Nova Kaledonio.

I.

Ne longatempe mi renkontis en Numea, kie mi loĝas, kanakan intruiston, kun kiu mi konatiĝis daŭrante la granda ekspozicio de Parizo en jaro 1889. — (Mi havis momente ofican forpermeson je 6 monatoj post restado da 7 jaroj en tiu ĉi kolonio).

Mi intencas jam publikigi kelkajn notojn pri la naturaj loĝantoj de tiu ĉi lando, la “kanakoj”, kaj mi, kompreneble, ne forlasus okazon por preni interesajn notojn pri tiu demando. Mi kunparolis longe kun mia malnova nigra amiko, kaj, interalie, mi tre bone rememoris la rakontaĵon, kiun li diris al mi, pri la komenco de l' mondo — laŭ la unuatempaj kanakoj de Uailu. Mi pensas ke la legantoj de la L. I. havos plezuron ĝin legi, ĉar, certe, ĝia rakonto estas tute ne eldonita.

Mi donas per grasaj literoj la kanakajn vortojn kiel la kanakulo diris al mi.

La bona Dio **baon**, deziranta la teron popoligi, sendis raton **sipu** kaj specon de granda vesperto **meu** kaj ilin surmetis la monton kuŝantan apud Uailu, kiun la kanakoj nomas: **sou min**.

Baon malpermesis manĝi semojn de arbo nomata: **bin ue**.

Ĉia tago **baon** donis al ili manĝon, sed iam li ĝin forgesis; tuj **sipu** kaj **meu** supreniris la arbon kaj manĝis la semojn de **bin ue**.

Baon ilin ne vidis, sed homo, kiu flugilojn havis, rakontis tuj la agon al **baon**, kiu respondis ke, ĉar ili forgesis liajn rekomendojn, li ne volas pli doni al ili manĝon, kaj ke ili restu ĉiam sur la tero.

Ambaŭ bestoj ne havante pli la ĉielan nutraĵon, serĉis sur la tero herbojn, semojn kaj kreskajojn por sia nutrado.

Sed, ĉar ĝi estis *vesperto* kaj *ratino*, el ambaŭ, nature, naskiĝis **popine** — kanaka virino estas tiel nomata ankoraŭ = kiu estas nigra.

La dua ido estas **tajo** — kanaka viro estas ankaŭ tiel nomata nune.

La **popine**, kiam ŝi estis pli maljuna, edziniĝis lacerton **ĵaj** kaj el ambaŭ naskiĝis idino, kiu edziniĝis la junan **tajo**.

De ĝi venis, laŭ la unuatempaj kanakoj de Uailu, la deveno de la kanakoj.


La vesperto kaj la ratino vidigis al siaj geidoj la herbojn kaj la semojn por ilia nutraĵo, kaj ĝi estas ankoraŭ la samaj, kiujn la kanakoj manĝas hodiaŭ.

Malfrue ĉiuj bestoj naskiĝis same kaj popoligis la kolonion.

La **mœndu**, kanakano kiu loĝas sur la okcidenta bordo (dum la Uai-
luoj loĝas sur la orienta bordo de nia insulo), posedas alian rakonton pri la
antikva akvamasego, sed mi ĝin ne konas sufiĉe. Sed mi jesas ke la maljun-
uloj montris al mi la monton (mi forgesis la nomon), sur kiu la antaŭuloj restadis
daŭrante la akvamasego.

Numea. Nova Kaledonio. Aprilo 1898.

E. Bardoulet.



Pri traduko de la Sanktaj Skriboj.

Al la estimata redakcio de "L. I."

Kelkfoje oni turnis la atenton de la legantoj de "L. I." je la tradukado
de la Biblio en Esp. Sendube tiu ĉi demando ankaŭ estas por la tuta espe-
rantista mondo sufiĉe grava kaj priparolinda.

La intereso, kiun mi mem havas por la dirita tradukado, donis al mi la
kuraĝon peti lokon en "L. I." por malgranda *prova* traduko el unu libro
de l' Nova Testamento. Ĝia enhavo ja ŝajnas esti vere internacia: la tuta
homaro el unu sango farita, sopiranta, laboranta por trovi la solan Dion, la
komunan Sinjoron, en kiu ni ĉiuj vivas kaj moviĝas kaj ekzistas.

Ĉiu leganto nun sen malfacileco povas kompari la tradukon kaj fari eble
necesajn rimarkojn — almenaŭ trovi, ĉu la esperantan tekston oni facile aŭ
malfacile, klare aŭ neklare, komprenas.

Se la Biblio aŭ parto da ĝi estas tradukota, nur en treege bona, klara
kaj bela lingvo ĝi devas aperi. — *Björklinge* (Upsala län), Svedujo, la 11
majo 1898.

Kun tre granda humileco

Karl Otto Svanbom.

El la "Faroj de la Apostoloj".

(Prova traduko de S—m.)

Ĉapitro 17: 16—34.

Verso 16. Dum en Ateno Paŭlo ilin (Silas'on kaj Timoteon) estis aten-
danta, lia animo maldolĉiĝis en li, kiam li vidadis la urbon plenan je idoloj.

17. Tial li interparoladis en la sinagogo kun la judeoj kaj la adoran-
taj (Dion) kaj sur la placo ĉiutage kun la renkontantaj.

18. Kaj iuj el la epikureaj kaj la stoikaj filozofoj disputis kun li; kaj
diris kelkaj: "Kion tiu ĉi babilanto volas diri?" Sed aliaj: "Li ŝajnas esti
anoncanto de fremdaj dioj"; ĉar li ilin sciigis je la evangelio pri Jesuo kaj
la reviviĝo.

19. Kaj preninte lin ili kondukis al la Areopago, dirantaj: "Ĉu ni povas
sciigi, kia estas tiu ĉi nova instruo (aŭ: doktrino) proponata de vi?"

20. Ĉar fremdajn aferojn vi antaŭ niaj oreloj alportas; ni volas do
scii, kio volas esti tio ĉi."

21. — Ĉiuj atenanaj kaj la fremduloj loĝantaj inter ili al nenio alia
bonan tempon havadis ol diri kaj aŭdi ion novan. —

22. Kaj starante en mezo de la Areopago Paŭlo parolis:

"Viroj atenanaj, ke en ĉio vi estas tre religiaj (aŭ: diadoremaj), mi
vidas.

23. Ĉar ĉirkaŭirante kaj rigardante (precize) viajn sanktaĵojn mi tro-

vis ankaŭ altaron, sur kiu oni enskribis: "AL DIO NEKONATA". Kion tial vi nekonante adoras, tion mi anoncas al vi.

24. La Dio farinta la mondon kaj ĉion, kio estas en ĝi, tiu, la Sinjoro de ĉielo kaj de tero, en manofaritaj temploj ne loĝas;

25. nek Li estas servata per la manoj de homoj, kvazaŭ ion bezonanta, ĉar Li mem donadas al ĉiuj vivon kaj spiron kaj ĉion.

26. Li el unu sango faris la tutan homaron por loĝi sur la tuta supraĵo de la tero, kaj Li metis difinitajn tempojn kaj limojn de ilia loĝado;

27. por ke ili serĉu la Sinjoron, se eble palpante ili trovos Lin, kvankam Li ne estas malproksima de ĉiu inter ni.

28. Ĉar en Li ni vivas kaj moviĝas kaj ekzistas, — kiel ankaŭ kelkaj el viaj poetoj diris: "Ĉar ni estas ankaŭ Lia gento."

29. Estante nun gento de Dio ni ne devas opinii, ke la diaĵo estas simila je oro aŭ arĝento aŭ ŝtono, skulptaĵo de homa arto kaj elpensado.


30. Sed la Dio, havinte malseveron je la tempoj de nescio, nun la homojn ordonas, ke ili ĉiuj ĉie alianimiĝu;

31. pro tio ke Li difinis tagon, en kiu Li juĝos la mondon en justeco per Homo, kiun Li elektis; kredon oferante al ĉiuj revivigante tiun el mortintoj."

32. Sed aŭdante la diron reviviĝon de mortintoj, kelkaj ekmokis, aliaj diris: "Ni aŭdos vin ree pri tio ĉi."

33. Tiel Paŭlo eliris el la mezo de ili.

34. Kaj kelkaj viroj unuiĝis kun li kaj kredis, inter kiuj estis ankaŭ Dionisio Areopagano, kaj virino nomita Damaris' kaj aliaj kun ili.



Juĝataj bestoj.

Tiuj ĉi vortoj strange sonas en niaj oreloj; al ni estas strange aŭdi, ke senprudenta besto povas esti laŭ solena kondamno ekzekutita, elpelita aŭ eĉ interdiktita, apartigita de la religio. Sed antaŭ 200—300 jaroj procesoj kontraŭ bestoj estis tre ordinara kaj ofta apero, kiu nenium mirigis aŭ ridigis. Tiuj ĉi procesoj ne sole amuzos nin, sed ankaŭ pentros al ni psilogion de l' tiama societo.

Procesoj kontraŭ bestoj per nenio distingiĝas de la ordinaraj. Kiam iu besto faras ian krimon, antaŭ ĉio oni arestas ĝin, por ke ĝi ne forkuru, kaj metas ĝin kune kun krimuloj-homoj en malliberejon. Dume malfeliĉa nevola krimulo sidas en malliberejo, oni fervore esploras ĝian aferon kaj post pli-malpli longa tempo venigas ĝin fine en juĝejon. Ricevinte respondojn de ĉiuj atestantoj, sinjoroj juĝistoj komencas demandadi la juĝaton. Ruza besto ŝajnigas sin surdamuta kaj respondas ĉiujn demandojn per profunda silento. Plej elokventa admono penti kaj konfesi la krimon ankaŭ restas sen rezultato. Tiam la juĝistoj, perdinte paciencon, devigas obstinulon paroli per turmento. Efektive, en la juĝejo baldaŭ estas aŭdata porka, ĉevala, hunda aŭ bova blekado laŭ la gento de juĝata besto. La sonoj estas nedifinitaj kaj malmulte kompreneblaj, sed sperta juĝista orelo bone aŭdas en plendaj krioj de la malfeliĉa besto sinceran konfesion pri la farita krimo. Tiam finiĝas la juĝa esplorado kaj komenciĝas juĝaj disputoj. Prokuroro fervorege subtenas la kulpigon kaj postulas plej severan punon por la obstina, nepentema kri-

mulo; defendanto de la malfeliĉa besto ne malpli energie penas senkulpigisian klienton; oni aŭdas elokventajn sentoplenajn parolojn kun multenombraj citatoj el la Sankta skribo kaj el verkoj de sanktaj patroj; estas legataj tutaj fragmentoj el antikvaj filozofoj...

Multaj el tiuj ĉi procesoj estas tre interesaj. Tiel, en 1457 jaro en Francujo ia porko kaj ĝiaj ses idoj estis kulpigitaj en mortigo de kvinjara knabeto Marten. La porko estis, laŭ la juĝa decido, pendita per malantaŭaj piedoj, sed partopreno de la porkidoj en la krimo ne estis pruvita, kaj ili estis senkulpigitaj. Bonkora juĝisto prenis al si la malfeliĉajn orfetojn kaj kredeble formangis ilin poste rostitajn. Poste en Bazel, en 1474 jaro, ia koko naskinta ovon estis kulpigita en kuniĝo kun diablo kaj kondamnita al bruligo. Fine, jam en 1750 jaro, en Francujo, ia malfeliĉa azenino estis kulpigita malmoralan konduton, sed, kiam loka pastro skribe atestis ĝian bonan moralecon, juĝistoj estis devigitaj pravigi ĝin.

Ankoraŭ pli interesaj estas civilaj procesoj kontraŭ tutaj aroj da tiaj bestoj, kiel ekzemple musoj, ratoj, akridoj, vermoj, muŝoj ktp. Kiam tiuj ĉi rabistoj komencas tro arogante dezertigi kampojn aŭ ĝardenojn de iaj vilaĝanoj, tiuj ĉi lastaj kun granda peno kolektas necesan sumon da mono, dungan advokaton kaj komencas juĝan disputon kontraŭ la arogantaj rabistoj. La proceso daŭras tre longe, iam kelkajn jarojn, kaj finiĝas ordinaro per la juĝa decido — forigi la plendatojn el la teritorio de l' plendantoj. Sed obstinaj, maldelikataj bestoj malofte atentis la voĉon de justeco kaj ordinaro daŭrigas sian rab-agadon, kvazaŭ ili tute ne scias pri la juĝa decido. Tiam malfeliĉaj vilaĝanoj rekomencas la proceson, nun en eklezia juĝo kaj post multegaj elspezoj kaj klopodoj atingas fine plej altan punon por siaj kontraŭuloj: apartigon de la eklezio kaj malbenon. Cetero ruzaj bestoj tre ofte foriras el la kampoj de malfeliĉaj vilaĝanoj ne atendante tiun ĉi severan kondamnon, aparte, se ili ne trovas jam tie ĉi sufiĉe da nutraĵo.

Iafoje advokato de bestoj tiel lerte defendas siajn klientojn, ke juĝistoj anstataŭ elpelo dediĉas al ili ian fruktoportan kampon aŭ arbaron por loĝado kaj nutrado. Tiel, unufoje ian teritorion atakis blankaj vermoj. Lokaj loĝantoj ne eltoleris la ofendon kaj plendis al juĝo. La lasta atendis dum ia tempo la respondon de la vermoj kontraŭ tiu ĉi plendo: sed la vermoj estis kredeble malmulte spertaj juristoj kaj ne rediris kontraŭ la plendo ĝustatempe. Tiam la juĝistoj elektis advokaton por la vermoj kaj komencis forestan*) juĝadon. Defendanto de vermoj tiel bone argumentis, ke juĝistoj konsentinte kun li, ke la vermoj estas kreitaĵoj de Dio kaj tial havas plenan rajton vivi, decidis dediĉi al la plendatoj arbaran kaj neloĝitan lokajon, por ke ili povu vivi sen malutilo al la prilaborataj kampoj.

Ankoraŭ pli interesa estas proceso kontraŭ musoj. Tiuj ĉi bestetoj tiom multobliĝis en mezo de XVI centjaro en Otena episkopato, ke la loĝantoj de tiu ĉi lasta, timante malsaton, komencis kontraŭ ili proceson. La musoj estis vokitaj en juĝejon, sed ial ne venis. Tiam oni volis alpaŝi al la foresta juĝado, sed la defendanto de l' musoj energie protestis, montrante, ke liaj multenombraj klientoj ne estis bone sciigitaj pri la juĝo. Oni faris ankoraŭ unu sciigon de katedro de ĉiu paroĥo, sed ankaŭ vane. Tiam la musa advokato bone montris, ke liaj klientoj, loĝantaj ofte tre malproksime, ne povas baldaŭ veni; ke ilia vojo estas longa kaj danĝera; ke plej senkompataj iliaj malami-

*) Ĉe foresto de plendato.

koj — katoj, sciiginte pri tiu ĉi afero, ĉie atendas ilian alvenon. Elĉerpinte ĉiujn rimedojn por prokrasti la juĝadon, li turnis sin al humaneco kaj justeco de la juĝistoj kaj finis sian elokventan parolon per la sekvantaj vortoj: “Nenio povas esti pli maljusta, ol tiuj ĉi komunaj kondamnoj, kiuj frapas tutajn familiojn; kiuj punas infanojn pro krimoj de iliaj gepatroj; kiuj rigardas nek sekson nek aĝon kaj punas eĉ tiujn, kiuj danke al sia delikata aĝo aŭ kadukeco estas tute nekapablaj krimi.”

Ĉio tio ĉi montras, ke en la mezaj centjaroj oni agis kun bestoj tiel juste, kiel oni ne ĉie kaj ne ĉiam agas nun eĉ kun homoj. Cetera la preparolata apero apartenas ne escepte al la mezaj centjaroj: ĝi estis ankaŭ en antikvo profunda. Tiel, ni trovas ankoraŭ en leĝaro de Mozes regulon, laŭ kiu bovo mortiginta homon devas esti mortebatita per ŝtonoj, en antikva do Grekujo ne sole bestoj, sed ankaŭ senvivaj objektoj, kaŭzintaj morton al homo, devis esti juĝataj kaj forigataj el la lando. Tiun ĉi moron aŭ leĝon aprobas eĉ tia granda filozofo, kiel Platono.

Naskiĝinte en profunda antikvo procesoj kontraŭ bestoj konserviĝis parte ĝis nun, prefere eĉ sudaj slavoĵ. Tiel ekzemple, kiam en 1866 jaro en unu slovaka valo aperis amasego da akridoj, lokaj vilaĝanoj kaptis unu el tiuj ĉi krimuloj, senkompate dezertigintaj iliajn kampojn, juĝis ĝin, kondamnis al morto kaj solene dronigis ĝin en rivero eĉ helpo de tuta vilaĝo. En la Nigromontanujo ĝis nun ekzistas moro, laŭ kiu ĉiu besto, kaŭzinta al homo morton aŭ kriplon, devas esti juĝata de vilaĝaj maljunuloj.

Ekzistas sciigo, ke ankaŭ en Rusujo, en mezo de XVII centjaro, unu azeno estis forsendita, laŭ juĝa decido, Sibirujon.

N. Sutkovoĵ.

La najbaroj.

Fabelo de M. E. Saltikov.*)

(Tradukis el lingvo rusa V. Laskin).

En unu vilaĝo estis du najbaroj: Ivan Riĉa kaj Ivan Malriĉa. La riĉa estis honorata per la nomoj “sinjoro” kaj Semenĉ**), la malriĉan oni nomadis simple Ivan, iafoje eĉ Ivaŝka. Ambaŭ estis bonaj homoj, Ivan Riĉa eĉ la plej bona. Li estis filantropo en la tuta signifo de l' vorto. Li ne produktadis “valorojn”, sed pri la dispartigo de l' rikaĵoj pensis tre noble. “Tio-ĉi

*) M. E. Saltikov (Ŝĉedrin — lia pseŭdonimo) estis granda rusa satiristo, tute originala laŭ sia stilo, laŭ la formo de siaj verkoj, ĉiam sprite kaj senlace vipanta la difektojn de l' rusa vivo. Bedaŭrinde la plej granda parto da liaj verkoj tuŝas demandojn speciale rusajn, la plej intimajn flankojn de l' rusa vivo, kaj tial estas tute nekomprenebla por nerusoj. Danke al tiu cirkonstanco Saltikov estas malmulte konata ekster la limoj de Rusujo. Tamen en liaj verkoj oni povas trovi multon interesan ankaŭ por eksterlandanoj. La prezentata nun fabelo prezentas mokon je tiuj, kiuj proponas diversajn radikalajn rimedojn por forigi la malriĉecon de l' rusa popolo, kaj vidas la kaŭzon de l' malbono en neegaleco de rajtoj kaj devoj, en manko da privata iniciativo k. t. p. La fabelo prezentas ne sole la mokadon de tiaj projektoj, sed ankaŭ de l' sinjoroj projektantoj, kiuj, espriminte la ideon, pensas ke ili per tio jam forigis la malbonon kaj trankvile forveturas ĝui per vestfala ŝinko aŭ franca vino.

**) Semenĉ = Semenido, t. e. filo de Semen. En Rusujo oni ĉiam uzas tian formon de l' nomo, aldonante ĝin al la nomo de la persono, kiam oni parolas kun estimo kaj ĝentileco.

Red.

Red.

estas de mia flanko malgranda ofero“, diradis li: “aliaj ne produktas valorojn kaj pensas malnoble, tio-ĉi estas jam malalteco, sed mi estas ankoraŭ sufiĉe bona.“ Ivan Malriĉa tute ne pensis pri la dispartigo de l' riĉaĵoj (li ne havis por tio la tempon), sed anstataŭ tio li produktadis valorojn kaj ankaŭ diradis: “tio-ĉi estas de mia flanko malgranda ofero.“

Ili kunvenadis vespere antaŭ la festoj, kiam ĉiuj estas liberaj, sidigadis sur la benko antaŭ la domo de Ivan Riĉa kaj babiladis.

— Kun kio estos la supo ĉe vi morgaŭ? demandas Ivan Riĉa.

— Kun nenio, respondas Ivan Malriĉa.

— Kaj ĉe mi kun viando.

Ivan Riĉa oscedas, metas la signon de kruco sur la buŝon, ekrigardas la malriĉan kaj kompatas lin.

— Strange estas en la mondo! diras li: se la homo senĉese laboras, li manĝas la supon sen viando eĉ en la festoj; se li sin okupas per utila nenionfarado, li manĝas la supon kun viando eĉ en la simplaj tagoj. Kia estas la kaŭzo de tio-ĉi?

— Mi ankaŭ pensis pri tio; sed mi ne havas la tempon por la pensado. Apenaŭ mi komencas pensadi, mi devas veturi en arbaron; apenaŭ mi alveturigis lignon el la arbaro, mi devas plugi aŭ veturigi sterkon sur la kampon. Tiamaniere la pensoj foriras malproksimen pro la aferoj.

— Tamen oni devas klarigi tion-ĉi.

— Jes, oni devas.

Oscedas ankaŭ Ivan Malriĉa, metas la signon de kruco sur la buŝon kaj iras dormi kaj sonĝas morgaŭan supon sen viando. Li vekigis matene kaj vidas, ke Ivan Riĉa faris al li surprizon — alsendis iom da viando por la supo.

En sekvanta antaŭfestoj la najbaroj kunvenas ree kaj komencas interparoli pri tio-sama.

— Ĉu vi kredas al mi, diras Ivan Riĉa: mi ĉiam pensas pri tio, kiel vi estas ofendita per la sorto kompare min!

— Eĉ por tio mi dankas! respondas Ivan Malriĉa.

— Sendube, mi alportas ne malgrandan utilon al la societo per miaj noblaj pensoj, sed se vi ne plugus la kampon, mi estus sen pano. Ĉu ne estas vere?

— Vere, sed mi devas plugi la kampon, alie mi mem mortos pro malsato.

— Tre saĝa estas tia meĥaniko! Tamen vi ne pensu, ke mi aprobas ĝin. Ne, pro Dio. Mi ĉiam pensas, ke al vi ankaŭ estu bone, ke mi havu mian porcion kaj vi — la vian.

— Por tio-ĉi ankaŭ koran dankon! Efektive, sen via helpo mi manĝus ĉiam nur pecigitan panon en kvaso.*)

— Kion vi diras? Forgesu tion-ĉi. Mi tute ne volas rememorigi vin pri miaj bonfaroj. Kiom da fojoj mi havis intencon disdoni duonon da mia haveco al malriĉuloj, kaj mi efektive disdonadis. Kio do? Hodiaŭ mi fordonas unu duonon da haveco kaj morgaŭ mi ricevas tri kvaronojn anstataŭ tio.

— Sekve, kun procento!

— Kion fari? Mi forkuras de riĉeco, sed la riĉeco sekvas min ĉie. Mi disdonas unu plenmanon da mono kaj ricevas du, nesciate de kie. Tia estas mirindaĵo!

*) Kvaso = acidajo, acida trinkaĵo.

La najbaroj komencas oscedi. Sed dume la riĉulo pensas, kion li devas fari, ke Ivan Malriĉa morgaŭ havu la supon kun viando, kaj elpensas.

— Aŭskultu, mia kara: jam ne estas longe ĝis la nokto, iru en mian ĝardenon kaj faru tie unu bedon, vi ludos per la fosilo unu horon, kaj mi rekompencos vin, kvazaŭ vi efektive laborus.

Ivan Malriĉa ludas per la fosilo unu horon, alian, kaj en rezultato — kvazaŭ li efektive laborus.

Ĉu longe, ĉu nelonge babiladis la najbaroj, nur ĉe Ivan Riĉa tiel flamiĝis la koro, ke li ne povis suferi. — Mi iros al la ministro, diras li, kaj parolos: vi estas okuloj de l' reĝo, vi punas kaj pardonas laŭ via bontrovo, ordonu egaligi min en ŝarĝoj kun Ivan Malriĉa! Li devas liveri unu rekruton, kaj mi unu, li unu fojon veturigos estraron*), kaj mi unu fojon; li devas pagi unu kopekon de ĉiu desatino da kampo, kaj mi unu kopekon.

Kiel li diris, tiel faris. Li venis al la ĉefa ministro kaj klarigis al li ĉion. La ministro laŭdis Ivanon Riĉan kaj diris: "Savu vin Dio, ke vi ne forgesas vian malriĉan najbaron". Kaj li ordonis, por fari eksperimenton, egaligi ambaŭ Ivanojn, ke ne estu plu, kiel antaŭe: unu portis ĉiujn ŝarĝojn kaj alia kantis la kantojn.

Ivan Riĉa tre ĝoja revenis en la vilaĝon. "Nu, mia kara! ni estas tute egaligitaj en ĉiuj ŝarĝoj. Mi ne havos plu iajn preferojn antaŭ vi. Vi devas liveri unu rekruton, kaj mi unu, vi unu fojon veturigos estraron, kaj mi ankaŭ unu fojon, vi pagos unu kopekon de desatino, kaj mi unu kopekon. Tre baldaŭ vi havos ĉiutage viandon en via supo pro tia egaligo."

Post tio Ivan Riĉa forveturis al varmaj akvoj, kie du jarojn sin okupadis per utila nenionfarado. Li vivis en Vestfalujo, manĝis tie vestfalan ŝinkon, vivis en Strasburgo, manĝis strasburgajn pasteĉojn, vivis en Bordeaux (Bordo'), trinkis vinon bordoan, fine alveturis en Parizon, ĉion manĝis kaj trinkis. Per unu vorto, li tiel gaje vivis en eksterlando, ke apenaŭ povis reveni hejmen. Kaj ĉiam li pensis pri Ivan Malriĉa: "sendube, post la egaligo li manĝas per la plena buŝo!"

Dume Ivan Malriĉa ĉiam laboradis. Hodiaŭ li plugas, morgaŭ erpas, hodiaŭ falĉas herbon, morgaŭ sekigas ĝin. Lia edzino laboras kune, kaj la infanoj penas labori eĉ iom. Per unu vorto, la tuta familio de l' mateno ĝis vespero laboras senlace, tamen manĝas supon sen viando, kaj eĉ en la festoj ne havas surprizojn.

Ivan Riĉa estis tre mirigita, kiam ekvidis sian najbaron en antaŭa malriĉeco. Li eĉ pensis, ke Ivaŝka fordrinkas sian havon. Sed Ivan Malriĉa facile montris, ke li ofte ne havas monon eĉ por la salo. Li montris sian inventaron, kaj ĉio estis en plena tuteco: la bruna kripla ĉevalo — 1, la bruna bovino kun flavaj makuloj — 1, ŝafino — 1, veturilo, plugilo, erpilo. Per unu vorto, oni ne povis kulpigi lin en malŝparemeco.

— Ho Dio! Kia do estas la kaŭzo de tio-ĉi? Nun ni estas egaligitaj; niaj rajtoj kaj pagoj estas tute egalaj, kaj sen ia utilo por vi. Kia estas la kaŭzo de tio-ĉi?

— Mi mem pensas: kia estas la kaŭzo, respondis malĝoje Ivan Malriĉa.

Ivan Riĉa komencis mediti kaj baldaŭ trovis la kaŭzon. Li diris: ni havas nek societatan, nek privatatan iniciativon. En tio-ĉi estas la kaŭzo. La

*) Unu el tiel nomataj "naturaj devoj" en Rusujo — la devo de l' vilaĝanoj liveri ĉevalojn al la oficistoj vojaĝantaj pro oficaj aferoj.

societo estas indiferenta, ĉiu pensas nur pri si mem. Oni devas vekigi la societeton!

Dirita, farita! Ivan Riĉa kolektis la kunvenon, havis brilantan paroladon pri la utilo de societa kaj privata iniciativo. Li paroladis vaste, elokvente kaj klare, kvazaŭ ĵetadis la perlojn antaŭ la porkoj. Li montris per la ekzemploj, ke nur tiuj societoj prezentas garantion de progreso kaj vivemeco, kiuj povas zorgi pri si mem, sed tiuj societoj, kiuj lasas faktojn fariĝi sen ia societa partopreno, estas difinitaj al progresiva mortado kaj al fina pereco. Per unu vorto, li diris ĉion, kion tralegis en Alfabeto-kopeko.

La rezultatoj superis ĉiujn esperojn. La blinduloj ne sole rericevis la senton de vidado, sed eĉ enfalis en la pekon de memkonscio. La popolamaso krias de l' ĝojo, Ivan Riĉa estas honorata kaj nomata heroo. Oni decidis unuvoĉe: 1) la drinkejon neniigi por ĉiam; 2) meti la fundamenton de memhelpado per la fondado de la societo de memvola kopeko. En tiu-sama tago, laŭ la nombro de l' vilaĝanoj, en la kason de l' societo estis enmetita sumo — 2023 kopekoj. Krom tio, Ivan Riĉa oferis 100 ekzemplerojn da Alfabeto-kopeko.

Post tio Ivan Riĉa ree forveturis al varmaj akvoj, kaj Ivan Malriĉa ree sin okupis per laboroj, kiuj nun danke al memhelpado kaj Alfabeto-kopeko, sendube devis alporti centoblajn fruktojn.

Pasis unu jaro, pasis la alia. Ĉu manĝis Ivan Riĉa vestfalan ŝinkon kaj strasburgajn pasteĉojn, mi ne povas diri. Mi scias nur, ke reveninte hejmen, li estis tute frapita per mirego.

Ivan Malriĉa sidas en sia ruiniĝanta dometo — malgrasa, konsumita. Sur la tablo staras la taso kun la pecigita pano en kvaso, en kiun lia edzino enverŝis, pro la festo, unu kuleron da oleo de kanabo por la bonodoro. La infanoj rapidas manĝi, kvazaŭ ili timis, ke venos iu kaj postulos sian porcion.

— Kia do estas la kaŭzo de tio-ĉi? preskaŭ kun malespero ekkriis Ivan Riĉa.


— Kaj mi diras: kia estas la kaŭzo? respondis Ivan Malriĉa.

Ree komenciĝis antaŭfestaj paroladoj sur la benko antaŭ la palaco de Ivan Riĉa. Sed kiom ajn ili meditadis, ili tamen nenion elpensis. Ivan Riĉa komence pensis, ke tio-ĉi devenas de tio, ke ni ne estas ankoraŭ maturaj, sed post la meditado li konvinkiĝis, ke manĝi la kukon kun plenigaĵo ne estas tiel malfacila scienco, ke por tio-ĉi oni devus havi la ateston de matureco. Fine ili decidis sin turni al vilaĝa saĝegulo kaj filozofo Ivan Malsagulo. Li estis lama ĝibulo, kiu pro la kripleco tute ne produktadis valorojn kaj nutriĝis per tio, ke li tutan jaron kolektadis pecetojn da pano sub la fenestroj. Oni diris, ke li estas tre saĝa, kaj li tute meritis tian gloron. Neniu estis pli kapabla klarigi ian komplikitan aferon kaj mirigi homojn per sia stranga parolado. Se li antaŭdiris ruĝan kokon (brulegon), — jam la koko ie sidas sur la tegmento kaj batas per laflugiloj, se li antaŭdiras hajlon, — jam kuras el kampoj timigita de hajlo brutaro. Ĉiuj timis lin, kaj kiam sub la fenestro frapadis lia lambasteno, la domestrinoj rapidis doni al li la plej bonan pecon.

Kaj en tiu-ĉi fojo li pravigis sian gloron de antaŭ-vidanto. Apenaŭ Ivan Riĉa rakontis al li ĉiujn cirkonstancojn de l' afero kaj demandis: kia estas la kaŭzo? la Malsagulo sen ia meditado respondis: "tiel estas difinita en la plano!"

Ivan Malriĉa tuj komprenis la parolon kaj malespere balancis la kapon. Sed Ivan Riĉa nenion povis kompreni.

“Ekzistas la plano“, diris Malsaĝulo: “kaj en tiu-ĉi plano estas skribita: Ivan Malriĉa loĝas ĉe la disfluo de l’ akvoj, kaj lia loĝejo estas simila al truplea kribrilo. Danke al tiu-ĉi kaŭzo la riĉeco fluas preter kaj trae, ĉar ĝi havas nenian haltigon. Sed vi, Riĉa, loĝas ĉe la defluo, kien de ĉiuj flankoj fluas la riveretoj. Via domo estas vasta, ordigita, kun firmaj bariloj. Se al via domo alfluas la riveretoj kun la riĉeco, ili haltas tie. Se vi hieraŭ disdonis duonon da via havo, hodiaŭ vi ricevas tri kvaronojn. Vi forkuras de riĉeco, sed la riĉeco sekvas vin ĉie. Sub ĉiu arbo por vi kuŝas la riĉeco. Tia estas la plano, kaj kiom ajn vi babilas, kiom ajn vi meditas, nenion elpensos, dum ekzistas tiu-ĉi plano.“




Printempo.

Jam de majo
Kun la gajo
Brilas suna la radio,
Jam de l’ floro
Bonodoro
Portas gloron al la Dio,
Jam kantetoj
De birdetoj
En arbaro sonorantaj

La belegan
Mirindegan
Ili estas la glorantaj,
Festas tero . . .
La rivero
Brilas per ondet’ argenta.
Bonfaranta.
Karesanta
Kun arbar’ murmuras vento.

D. Jegorov.



Pola literaturo en Svedujo.

Kun nia literaturo komencas konatiĝi pli kaj pli alilandaj nacioj. Mi ne diras jam pri la parencaj al ni nacioj, kiuj de longe aligas al si la verkojn de niaj verkistoj. Ĉe aliaj nacioj, kun kiuj ni havas malmulte da kultura komuniĝo, nia literaturo ne estas ĉie bone konata; sed malmulte konata tiu ĉi literaturo pli kaj pli ofte ekscitas la scivolon poste la raven en ia alilanda amanto de la beleco, kiu lernas nian (polan) lingvon por konatigi siajn kunlandanojn kun la malkonataj trezoroj, kiujn enhavas pola literaturo, mira, ke ĝi ĝis longe restis nekonata.

Antaŭnelonge konvinkadis nin s-ro Curtin, angla tradukisto de la verkoj de aŭtoro de “Quo vadis“, ke traduko de la Sienkieviĉa trilogio donados tre bonajn profitojn al ĝia Amerika eldonanto.

La germanoj ankaŭ de longe jam konatiĝis kun la belecoj de polaj rakontoj kaj versaĵoj, argumenton por tio povas servi la disvastigitaj tradukoj en germana lingvo de la verkoj de Mickieviĉ, Krasinski, Malĉevski, Kraŝevski, Korzeniovski, Rzevuski kaj Sienkieviĉ en la plejmalkara eldono de la plej belaj eŭropaj verkoj de *Reclam*.

Iafoje ni aŭdas de la francoj, interesantaj sin por la alilanda literaturo, ke “*Bartek le vainqueur*“ kaj “*Yanko le musicien*“ *sont des perles fines de la belletristique contemporaine*“ kaj “*Sans dogme*“ *donne à penser . . .*“ esprimo kvankam tute simpla, sed tamen atestanta, ke nia literaturo estas jam sufiĉe konata en Francujo kaj havas ankaŭ tie siajn adeptojn.

Sed en la lasta tempo komencis ekscitadi la scivolon pola literaturo

ankaŭ en Svedujo, kie tradukas polajn verkojn konata poeto Jensen kaj fraŭlino Ellen Wester. Ŝi ellernis la polan lingvon tute okaze. Sentante en si la literaturan talenton, ŝi veturis en la 1893 jaro Peterburgon por ellernadi la rusan lingvon kaj aligi al la patra literaturo la verkojn de Turgenjev kaj Tolstoj. Sed en la vojo ŝi konatiĝis kun unu familio, kiu paroladis inter si en ia lingvo "tre bonsona", kaj ŝi eksciis de tiuj ĉi kolegoj de la vojo, ke ilia lingvo apartenas al la nacio, konata per sia kuraĝo en la bataloj kun ŝiaj prapatroj kaj patra lingvo de la amata per ŝi, konata muzika verkisto Ŝopin.

Per ili ŝi konatiĝis kun la unuaj sciigoj de nia lingvo, kiu tiel ŝin interesigis, ke la tutan sian kelkemonatan restadon en la rusa ĉefurbo ŝi dediĉis al la ellernado polan lingvon, kaj tiel konatiĝis kun ĝi, ke, veturinta Svedujon, ŝi baldaŭ povis doni al siaj kunlandanoj la unuan sian tradukon de la rakonto de Orzeŝko: "Mirtala".

Poste, perfektigante sin en pola lingvo, fraŭlino Wester tradukis "Meir Jezofoviĉ" sub la titolo: "*I de djupa dalarna*" (En la profundaj valoj), "*Starke Simson*" (Forta Simsono) kaj "*Två poler*" (Du polusoj).

Rapidata per la eldonanto, svedigis ŝi poste la kolekton de la noveloj de Sienkieviĉ.

En la plejgranda sveda jurnalo "Stockholms Dagblad" estis lokita ŝia traduko de "Sur la klara bordo", kiun volis traduki por la esperanta "Biblioteko" mortinta Wasniewski, kvankam la morto malhelpis al li fari tion.

Krom la diversaj tradukoj fraŭlino W. ofertas multe da tempo por konatigi siajn kunlandanojn kun nia movado de saĝoj kaj kun nia pasinteco en tre favoraj por ni, poloj, artikoloj en diversaj svedaj gazetoj kaj jurnaloj.

La kompetentulo de la polaj kaj svedaj rilatoj, loĝanta jam de 30 jaroj en Stokholmo, s-ro Bukowski, parolas tre bone pri tiuj ĉi laboroj, laŭdante ilian formon kaj bonan tradukon.

Pola gazeto "*Kraj*", eldonata en Peterburgo, diras, ke fraŭlino Wester intencas: 1) eldoni en sveda lingvo la biografiojn de la eminentaj poloj; 2) disvastigadi fervore en Skandinava duoninsulo la kulton de nia beltristiko, tradukante ĉiujn plej bonajn verkojn; kaj 3) viziti la Regnon polan, Galicion kaj Poznanon, por rakonti siajn impresojn el la vojaĝo al la legantoj de la svedaj gazetoj.

Tradukis el la pola gazeto "*Kraj*" (Lando)

A. Zakrjevski.

Gramatikaj rimarkoj.

En la numero 8--9 de "Lingvo Internacia" jaro 1897, sur la paĝo 120:a kaj la sekvantaj, s-ro V. Reiner diris kelkajn aferojn tre verajn kun aliaj ne tiel egale pravaj, laŭ nia opinio.

Mi plene konsentas kun li pri la malĝusteco rimigi *a* kun *o* aŭ *aj* kun *oj* kaj, en ĝenerala principo, sonojn ne absolute similajn inter si.

1:e) Logike, ĉia litero de nia lingvo, kie ajn ĝi estus, en la komenco, mezo aŭ fino de l' vortoj, devas konservi ĉiam senescepte la sonon propran, klare distingeblan, kiun ĝi posedas en la alfabeto Esperanta. Tiu ĉi regulo, kaj ĝi sola, ebligas la eviton certan de ĉiu konfuzo inter diversaj finiĝoj gramatikaj (*o—a*; *e—i* k. t. p.), kaj sekve la malkomprenojn, kiuj povus el tio rezulti. Tiel same kiel ili ne donus al *a*, en la komenco aŭ mezo de

l' vortoj, la saman sonon ol al o, tiel niaj amikoj ne devas doni al tiuj vokaloj, en ia finiĝo gramatika, sonon similan, ne bone distingeblan kaj konfuzeblan.

2:e) Se la Rusoj inklinaj rimigi a kun o, aj kun oj penos elparoladi tute regule tiujn sonojn, ili komprenos, ke tia rimado estas kontraŭa al la klareco, al la logikeco kaj eĉ al la bonsoneco de nia lingvo, kiu el sia karaktero akceptas nur sonojn tre precizajn kaj neniel konfuzeblajn unu kun la alia. Kiam, en Esperanto, oni uzas poezion rimatan, oni devas preni nur sonojn absolute samajn kaj ne rimojn pli malpli dubajn, por nur diri tion ĉi. Sendube la poezio ĝuas pli grandan liberon ol la prozo, sed tiu ĉi libero ne permesas ŝanĝi, eĉ per nuanco, la sonon regulan de la literoj.

Se niaj malamikoj rimarkus tian rimadon, ili certe tirus el ĝi argumenton kontraŭ la ebleco de unuforma elparolado inter la uzantoj de la lingvo internacia. Ili pretendus ke la rusaj Esperantistoj rimigas a kun o pro tio, ke ili ne povas doni sonon diferencan al tiuj du vokaloj, en la silaboj neakcentitaj aŭ pli ĝuste finaj. Sed se ni akceptus la principon de tia rimado, ni devus konsenti, ke, pri la sono, ekzistas nenia diferenco inter tio kaj tia, io kaj ia k. t. p.

Al ni Francoj kaj, mi kredas, al ĉiuj popoloj bone distingantaj a fina de o fina, estas io tute netolerebla aŭdi version en o post verso en a. Nia orelo ofendita ĉiam kredas ke la rimoj alternas kaj ĝi atendas novan version en a por rimi kun la unua. Tiu ĉi ne venante, ni sentas plezuron tute kompareblan al tiu, kiun donus ario finanta per disonanco.

Tiel same kiel ni ne povus akcepti ke la vortoj "mot" kaj "mât", aŭ "dôme" kaj "dame" rima inter si, en la lingvo franca, — tiel ni ne povas elporti ke "ĉielo" rima kun "miela" aŭ "ĉevaloj" kun "valaj" en Esperanto.

* * *

Se pri la rimado mi opinias tute kiel s-ro Reiner, kontraŭe mi pensas tute diference pri la gramatika finiĝo, kiun devas ricevi la radiko, kiam ĝi fariĝas vorto difinanta ne nomon aŭ pronomon, sed verbon, adjektivan aŭ penson. (Vidu la ekzemplojn donitajn sur la paĝo 121:a, paragrafo 1:a.)

Laŭ mia juĝo, vorto, kiu difinas nek nomon nek pronomon, ne estas adjektivo; ĉar esence la adjektivo rilatas al nomo aŭ pronomo. Sekve la dirita vorto ne devas ricevi la finiĝon adjektivan.

Sed, por ke vorto ia povu ludi en frazo la rolon de adjektivo, estas necese ke sin trovu, en la frazo, ia nomo aŭ pronomo al kiu ĝi rilatus. Tiu ĉi kondiĉo ne estante plenumita en ĉiuj ekzemploj prenitaj de s-ro Reiner, la radiko ne povis ricevi la finiĝon adjektivan; ĝi ricevis logike la finiĝon adverban, kiel en ĉiuj similaj okazoj ĉe la ĝisnuna stilo Esperanta.

La fakto ke ia fremda lingvo sekvas alian regulon ne devas influi nin, ĉar se ni gvidus nin per la principoj de l' naciaj lingvoj, kien ni povus iri, Dio bona! Preferinda gvidanto estas la logiko kun la simpleco praktika, kaj certe la principo sekvata de d-ro Zamenhof posedas tiujn ecojn.

Oni povus formuli ĝin tiel:

1:e) Vorto ricevas la finiĝon adjektivan, se ĝi difinas nomon aŭ pronomon esprimitan. Ekz.: Petro estas bona — Mi trovis vian libron interesa sed longa — Hodiaŭ la vetero estas malbela; ĝi estas nebula kaj malvarma.

2:e) Vorto ricevas la finiĝon adverban, se ĝi difinas verbon, adjektivan, adverbon aŭ penson, resume ĉion, kio ne estas nomo aŭ pronomo. Ekz.:

Petro kantas bone — Estus interese sed longe vojaĝi tra la tuta mondo — Hodiaŭ estas malbele, estas nebule kaj malvarme — Mia patro estas tre malĝoja — Tute ĝuste vi pensas pri tio ĉi.

La supredirita duobla principo liberigas de ĉiuj duboj, kiujn povus elvoki la patraj lingvoj. Tiel la germana lingvo uzas ĉiumomente la saman formon por la adjektivo kaj la adverbo. Se oni ĝin prenas kiel gvidanto, oni do erarus sur ĉia paŝo. Same la franca lingvo kaj aliaj ankaŭ povus trompi tre ofte. Ĉu ni ne diras france: Il chante juste — Criez plus fort — Elle voit trouble — Cela coûte cher — Parlez moins haut — Allez vite — kaj tiel plu senfine? Sed en ĉiuj frazoj ĉi okulvideble ni erarus, se ni tradukus la francan adjektivon per la konforma finiĝo adjektiva en Esperanto.

Konklude, d-ro Zamenhof bone kaj logike faris, gvidante sin per la regulo supredirita kaj la amikoj saĝe lin imitis en la ĝisnuna stilo Esperanta. La sola ekzemplo kiun citas s-ro Reiner "kvankam la plej bona estus silenti pri ili" ne detruas la aŭtoritaton de la aliaj. Ĝi estas plumeraro de la doktoro mem aŭ preseraro de l' kompostistoj. Alie oni ne komprenus la solecon de tiu ekzemplo, kontraŭ kiu protestas la konstanta stilo de l' doktoro, kiu diris kaj diras en ĉiuj okazoj: la plej bone estus, estas, estis aŭ estos, laŭ la tempo de l' verbo.

* * *

La rimarko pri la frazoj "kiam ili posedos la vortaron specialan al *ilia* sporto" — "per la radoj de *ilia* velocipedo ili povas transporti ĉien la konon" estas tute ĝusta. En la du frazoj *sia* devas anstataŭi *ilia*. Estante la kulpulo mi ne ŝanceliĝas por konfesi ke mi eraris. La manko da tempo devigante min tro rapidi, puŝita de la patra lingvo mi skribis instinkte, por tiel diri, *ilia* kiel france mi diris *leur*, ne *ses* aŭ *son*.

* * *

La korekto, kiun sinjoro Reiner montras pri "mi opinias ĝusta" (en la paragrafo 5:a), ne estas pli bona, laŭ mia opinia, ol la frazo citita. Oni ne povas diri "mi opinias ĝustan", ĉar unue nenio klarigas tie ĉi la uzon de la akuzativo, due nenio klarigas la uzon de la finiĝo adjektiva. Se mi ne eraras, la frazo devas esti: "mi opinias ke estas juste (ne "ĝust", erare metita) komuniki al la Esperantistoj". Vidu pli supre kion mi diris pri la finiĝo adjektiva kaj la finiĝo adverba.

* * *

En la sama paragrafo 5:a de *sia* letero, s-ro Reiner korektas ankoraŭ alian frazon. Li proponas ŝanĝi "prava" per "pravan" en la teksto de s-ro Langlet. Se li volas ekzameni la motivojn, kiujn mi tuj elvolvos, mi kredas, ke li konsentos kun mi pri la korekteco de la frazo kritikita "kiun mi trovis prava".

En la similaj okazoj, la nominativo montras ke ia difino ne apartenas per si mem al la objekto, sed nur ke *ni donas* al la objekto tiun ĉi difinon. La frazoj sekvantaj, ekzemple, prezentas signifon tute diferencon, se ni uzas en ili la nominativon aŭ la akuzativon:

Mi trovis la vinon bonan (tio estas: serĉinte la bonan vinon, mi ĝin trovis) — Mi trovis la vinon bona (eble la vino ne estis bona, sed mi ĝin trovis tia) — Mi nomis mian filon Adolffon (mi nomis mian filon, kiu havas la

nomon Adolfo) — Mi nomis mian filon Adolfo (mi donis al mia filo la nomon Adolfo) — Ili elektis lin reĝon, por ke li savu ilian patrujon de la ruino (ili elektis lin, kiu estas reĝo, por k. t. p.) — Ili elektis lin reĝo, por ke li k. t. p. (ili donis al li la reĝecon por ke li k. t. p.) — Mi trovis lin ĉagrenan (mi trovis lin en stato de ĉagreneco) — Mi trovis lin ĉagrena (eble li ne estis efektive ĉagrena, sed li ŝajnis al mi tia).

Sekve de ĉiuj ekzemploj ĉi, tre logike s-ro Langlet diris “kiun mi trovis prava”. Tion farante li ja imitis la aŭtoron mem de la lingvo, kiu kredeble pri tiu ĉi punkto, kiel pri la uzo de l’ adverba finiĝo, ne agis blinde kaj sen serioza pripenso. Homo kiu solvis tian problemon kiel estas Esperanto, ne gvidis sin instinkte, aŭ per senlogika imito, pri la formoj gramatikaj de sia stilo. La plej bone ni faros, se ni sekvos lin kaj ne pretendos korekti la modelojn kiujn li donis.

* * *

Kun s-ro Reiner mi konsentas ke “civilizataj” kaj “metata” devas esti anstataŭataj per “civilizitaj” kaj “metita”, ĉar la ago estas farita, ne farata, en la fazoj enhavantaj la du vortojn cititajn de li.

Sed mi opinias ke “fermata” kaj “malfermata” estis tute bone uzitaj de s-ro Moch, en la frazo citita, ĉar pri la sono de ia litero, la sono kiun ĝi *ricevas* gramatike, oni ne povas diri ke ĝi estas fermita aŭ malfermita; oni devas diri ke ĝi estas fermata aŭ malfermata. Simile, pri ia litero, ni ne dirus ke ĝi havas la sonon nomitan... sed la sonon nomatan...

Tre bone ankaŭ s-ro Moch diris “sin rusiganta” ĉar li volis paroli pri iu, kiu faris sin rusa, kiu prenis la naciecon de Ruso.

Vidu la paragrafon 6 de s-ro Reiner kaj la lokojn, kiujn li citas.

* * *

En la paragrafo 7 s-ro Reiner parolas pri la verbo “ori”. Tia verbo ne povas ekzisti tiel same kiel ne povas ekzisti la verboj “argenti” — “blanki” — “ruĝi” k. t. p. La “i” de l’ infinitivo ne havas la sencon “esti”, alie ni ne povus diri “manĝi” — “fari” k. t. p. Sed se la “i” de l’ infinitivo ne signifas “esti”, la verboj “ori” — “argenti” — “ruĝi” — “blanki” k. t. p. ne povas ekzisti, ĉar ili nenion signifus; ili neniel prezentus la sencon “esti ora” — “esti argenta” — “esti blanka” — “esti ruĝa” k. t. p. Mi ĝin ripetas: ili tute nenion signifus. Por esprimi la ideojn de tiuj verboj absolute mallogike formitaj, oni devas preni la verbon “esti” kaj la adjektivon. Ekzemple, oni devas diri “li estas ruĝa”, ne “li ruĝas”, kiel por alskribi la bonecon al iu, ni diros “li estas bona”, ne “li bonas”. Ĉu por diri pri iu, ke li estas viro, ni dirus “li viras”? Sed tiam ni havus ankaŭ, laŭ sama principo, “li servantas” — “li oficiras” k. t. p. (li estas servanto, oficiro). Ĉiuj verbaj finiĝoj estus do, por tiel diri, mallongigaĵoj de l’ verbo “esti”. Sed eĉ tiam por fariĝi plene logikaj ni devus diri ne: “esti, mi estas, mi estos” k. t. p. sed “i, mi as, mi os” k. t. p.

De alia flanko, se en “ori, mi bonas, li ruĝis” k. t. p. *i* egalus esti; *as* estas, *is* estis, kial la samaj finiĝoj havus alian signifon en “manĝi, mi faras, li donis”? Tiuj ĉi vortoj devus tiam signifi “esti manĝo, ni estas faro, li estis dono”. Kio estus absurda.

La vero estas ke la verbaj finiĝoj signas nur la modon aŭ la tempon por la elementoj Esperantaj al kiuj oni alligas ilin, sed tute ne povas doni

per si mem al ia vorto la signifon de verbo stata, aktiva aŭ pasiva. Tiu signifo dependas, ne de la finiĝo aldonita, sed de la naturo mem de l' radiko. Cetere la verboj de stato estas tre logike esprimataj, en Esperanto, *kiel la pasivaj*, per la verbo "esti" kaj la vorto diranta la econ aŭ la staton, kiun oni donas al la subjekto. Ekzemple: mi estas laca; ili estas malavaraj.

* * *

La rimarko pri "havantan" anstataŭ "havante" (paragrafo 8) estas tute prava, ĉar tie ĉi la participo estas adjektivo. Ĝi devas do ricevi la finiĝon adjektivan.

* * *

La paragrafo 9 korektas tre ĝuste la esprimon "post kelkaj jaroj", kiu povas nur servi por fakto estonta, sed tute ne por fakto estinta. Anstataŭ ĝi, s-ro Reiner donas "kelkajn jarojn" tute regule kaj li proponas ankaŭ "en daŭro de kelkaj jaroj", esprimo ankaŭ bona, nur se oni metos la artikolon antaŭ la vorto "daŭro". Oni povus diri egale bone "dum kelkaj jaroj".


* * *

Kiel s-ro Reiner mi ne komprenas la esprimon kiun li kritikis en sia lasta paragrafo. Unue, "ĝentilajn" ŝajnas al mi tre malbone elektita, ĉar pri vesto aŭ vizaĝo oni ne povas diri ke ili estas ĝentilaj. Due, la vorto "trouzite", kiu france signifas "dont on a abusé", faras la frazon tute nekompreneblan.

* * *

Per ĉio, kion mi ĵus skribis mi ne pretendas prezenti min kiel ian doktoron, kies voĉo devas esti aŭskultata kaj obeata. Mi simple diris, kion mi trovas prava kaj ĝusta. La amikoj volu kredi, ke neniel mi juĝas min pli klera ol ili. Mi estus speciale tre ĉagrena, se mia deziro utili al nia lingvo kaŭzus malĝojon aŭ ofendon al iu.

L. de Beaufront.



Espero.

L' espero estas bela roz'
Kun dornoj kaŝigantaj;
Ĝi gaje ridas al la ar'
De siaj esperantaj.

Sed proksimiĝu vi al ĝi.
Kaj ĝi sin tuj transvestas:
La florfolioj kaŝas sin
Kaj nur la dornoj restas.


Amiko.



Kvarlinio.

Mi ambaŭ adoris kun granda pasi'
Kaj ambaŭ al mi tre kruele malbonis:
La unu min kisis sen amo al mi.
L' alia min amis, sed kisojn ne donis.

Amiko.



Aforismoj

el sankta libro de buddhanoj "Dhammapada".*)

Malsaĝulo, scianta ke li estas malsaĝa, estas almenaŭ en tiu-ĉi rilato sciulo. Sed malsaĝulo, opinianta sin sciulo, estas nome tiu, pri kiu oni diras "li estas malsaĝa."

Kiu vojaĝiras akompanata de malsaĝulo, tiu suferas en daŭro de tuta vojaĝo. Societo de malsaĝulo estas tiel same malagrabla, kiel societo de malamiko.

Ne ekzistis, ne ekzistos kaj ne ekzistas nun homo, sole mallaŭdata aŭ sole laŭdata.

Nebonaj moroj estas koto en tiu-ĉi mondo kaj en alia. Tamen, ekzistas koto ankoraŭ pli nebona, koto ĉefaranga — malklereco.

Per boneco oni devas venki koleron; per bono oni devas venki malbonon; per malavareco — avarecon, per vero — mensogon.

Diru veron; ne cedu al kolero; donu al petanta ĉe vi helpon el tia malmulto, kian vi havas. Ĉe tiuj-ĉi tri kondiĉoj vi apudiĝos al dioj.

Venko naskas malamon, ĉar venkita sentas suferon. Kiu vivas pace, estas feliĉa, ne pensante pli nek pri venko nek pri malvenko.

Pli bona estas venki sin mem, ol venki tutan mondon.


Ne ekzistas fajro komparebla je pasio, malfeliĉo egala je malamo, malbono pleja ol ekzistado persona, bono pli alta ol trankvileco de animo.

"Ĉiuj agregatoj estas tempaj." Kiam oni estas bone penetrita de tiu-ĉi fakto, oni estas liberigita de sufero. Ĝi estas vojo de puriĝado.

"Ĉiuj agregatoj estas suferemaj". Kiam oni estas bone penetrita de tiu-ĉi fakto — oni estas liberigita de sufero. Ĝi estas vojo de puriĝado.

"Ĉiuj formoj estas sen realeco substancia." Kiam oni estas bone penetrita de tiu ĉi fakto, oni estas liberigita de sufero. Ĝi estas vojo de puriĝado.

Trad. N. A. Borovko.



Ellaborado de nia lingvo.

Nia lingvo, sendube, estas tre bona, sed ne sufiĉe ellaborita. Literatura nia estas tre malgranda, ĉar tre malmultaj homoj skribas en nia lingvo. Por ke nia literaturo estu granda kaj riĉa kaj por ke nia lingvo estu tute oportuna por esprimo de diversaj pensoj, la nombro da homoj, skribantaj en nia lingvo, devas pligrandiĝi. Por atingi tion ĉi, ni devas ĉiel vigligi homojn, skribantajn en lingvo internacia kaj igi ilin al tiu ĉi laboro. Por tiu celo mi proponas aranĝi apartan eldonantan komitaton en unu el la grandaj urboj kie estas multe da esperantistoj. Tiu ĉi komitato kolektas ĉiujn novajn verkojn en la lingvo internacia, originalajn kaj tradukitajn, kaj laŭ eblo eldonas plej bonajn kaj plej bezonajn el tiuj ĉi verkoj. Ricevinte ĉian verkon la komitato anoncas pri ĝi en la gazeto, por ke ĉiu esperantisto sciu, kiaj verkoj jam estas skribitaj en lingvo internacia kaj ke la aŭtoro de l' verko sciu, ke lia verko estas ricevita kaj estos konservita, ĝis la komitato havos eblon eldoni ĝin. Tiel, en la komitato povus kolektiĝi grandega provizo da verkoj en la lingvo internacia, kaj kiam materialaj cirkonstancoj de nia afero pliboniĝos ni ne

*) Laŭ franca traduko de F. Hù. Paris 1878.

havos mankon en literatura materialo por presado kaj el grandega provizo ni povos elekti por presado nur verkojn efektive bonajn kaj senriproĉajn. Mi proponas ankaŭ doni al la eldonanta komitato rajton kaj eblon rekompenci plej bonajn kaj plej diligentajn aŭtorojn per diplomoj kaj jetonoj. Ekzemple por 5 presaj folioj de bona traduka laboro la komitato donas al la aŭtoro diplomon, por 10 presaj folioj de bona traduka laboro la komitato donas al la aŭtoro jetonon. Redakcio de l' gazeto ankaŭ rekompencas siajn kunlaborantojn per diplomo por 1 presa folio de originala literatura laboro kaj per jetono por 2 presaj folioj de originala literatura laboro*). Mi pensas, ke tiu ĉi rekompenco kaj konvinko, ke ĉia bona literatura laboro estos konservita kaj iam eldonita, tre multobligos la nombron da verkistoj en nia lingvo kaj sekve multobligos nombron da homoj perfekte sciantaj nian lingvon. Krom tio, homo, iom laborinta por nia lingvo, estos multe pli aldonita al nia afero, ĉar la sukceso de nia afero estas parte lia persona intereso. Ni devas ankaŭ faciligi presadon de ĉiaj korespondaĵoj en nia gazeto kaj aranĝi en ĝi apartan rubrikon (ĉapitron) sub nomo "Rimarkoj". En tiu ĉi rubriko devas esti presata ĉia nova demando kaj rimarko, iel tuŝanta nian aferon. Ne ĉiu homo posedas liberan tempon kaj literaturan talenton, por skribi pli malpli grandan, detalan artikolon, kvankam ĉiu homo povas doni al ni bonan konsilon, fari bonan proponon kaj entute povas diri al ni ion bonan kaj utilan. Jen, por tiaj homoj devas ekzistadi en la gazeto aparta rubriko, kie oni povus en mallongaj vortoj eldiri siajn pensojn kaj opiniojn. Tio ĉi donus al nia gazeto pli multe da vivo kaj intereso, faros la gazeton vera ligilo inter esperantistoj kaj entute alportus tre multe da utilo al nia afero. Ni ne timu, ke multaj tradukoj portos en si postsignojn de ia nacia lingvo. Mi pensas, ke tio ĉi estas eĉ tre dezirinda. Per tradukoj ni ekscios apartaĵojn de ĉiuj ĉefaj eŭropaj lingvoj kaj prenos ĉiujn bonajn ecojn de ĉiuj lingvoj por nia internacia lingvo kaj atingos tion, ke nia lingvo estos tute riĉa, modela kaj ĉiujflanke ideala. Nur bona propraĵo de ia nacia lingvo eniros en lingvon internacian, ĉar nur plej bona propraĵo povas esti prenita de multaj diversnaciaj verkistoj. Entute, ni devas memori, ke lingvon ellaboras ne tiom scienculoj kaj artistoj-literaturistoj, kiom ordinaraĵaj literaturaj laboristoj kaj popola amaso. En ellaborado de lingvo ĉefan rolon ludas la nombro da homoj, kiuj parolas kaj skribas en tiu ĉi lingvo.

M. S. Rakitski.



Ankoraŭ kelkaj vortoj pri la skribado de la propraj nomoj.

Jam daŭre 1 ¹/₂ jaroj sur la paĝoj de nia gazeto konstante aperas la provoj solvi la demandon pri la skribado de la propraj nomoj. La sufiĉe akra polemiko inter la partianoj de la ortografia kaj la fonetika skribado povas tre multe malutili al nia afero en ĝia nuna stato, kvankam la demando pri la skribado de la propraj nomoj tute ne estas tiel grava, ke oni permesu al si malutili al la progreso de la lingvo mem nur pro la diversaj opinioj pri tiu ĉi objekto. Mi volonte konfesas, ke persone mi kun granda plezuro legadis

*) Homo, skribinta 2 presajn foliojn en gazeto, kutimos al literatura laboro, tute eniros en interesojn de gazeto kaj fariĝos konstanta kunlaboranto de gazeto jam sen ĉia rekompenco.

la spritajn artikolojn de s-roj Moch, Borovko kaj Gernet: ĉiuj la aŭtoroj estas sufiĉe konataj kiel spertaj kaj lertaj verkistoj, kaj la praktika pruvo de la taŭgeco de nia lingvo por ĉiuj literaturaj specoj, eĉ por la gazeta polemiko — estas farita. Estas vero, ke la demando mem restis nesolvita, sed, laŭ mia opinio, estas jam tempo meti finon al la disputo. Rememoru la sorton de Volapük, sinjoroj, kaj haltu por unu momento!

Estas ebla, ke al mi prosperos, se ne doni la finan solvon de la problemo, tamen proponi tielan eliron el la malfacila situacio, kiu kontentigos la plejmulton de la adeptoj de nia lingvo.

Post la atenta tralego de la artikoloj de s-roj Lemaire, Moch, Borovko, Gernet kaj Krikortz devas esti klara al ĉiu senpartia esperantisto, ke oni povas plene kaj senescepte akcepti nek la fonetikan, nek la ortografian skribadon laŭ tute praktikaj kaŭzoj, ne depende de la teoria indeco de tiu alia maniero.

La fonetika skribado, principe la plej konforma al la reguloj de nia lingvo, — ne estas plene akceptebla, ĉar en la esperanta alfabeto malestas multaj literoj, necesaj por regule transdoni la sonojn de multaj lingvoj (ekzemple la francajn nazajn sonojn, la rusajn sonojn Д, Ш, Ъ, la germanajn — g, fina ch, ä, ö, ü, anglajn — ll, th, svedan — å k. t. p.).

La severa ortografia skribado, tre oportuna por eviti la malkompreniĝojn kaj miksaĵojn, — ne povas esti konsekvence kaj plene efektiviĝata, ĉar multaj lingvoj uzas alfabetojn, tute malsimilajn al la esperanta (latina) alfabeto (greka lingvo, slavaj lingvoj, uzantaj la kirilan alfabeton) aŭ la latinan alfabeton kun plenigaĵoj, tute ne konataj per la internacia literaro (germana alfabeto kun ä, ö, ü, pola kaj bohema alfabeto kun z, a, e, c k. t. p.). Oni ne povas do postuli, ke ĉiu homo sciu tiujn ĉi alfabetojn kaj specialajn signetojn kaj ke ĉiuj presejoj havu ilin por presi la esperantajn verkojn kun severa gardo de la ortografia skribado.

Tial, — kvankam eĉ por la artikoloj, presataj en nia gazeto kaj por la verkoj, eldonataj de la diversaj kluboj kaj societoj esperantistaj, — oni devas krei unu mezan konsentigon, kiun mi proponas resumi en sekvantaj kvar reguloj:

1) Ĉiuj propraj nomoj, kiuj enhavas nur sonojn, ekzistantajn en la internacia lingvo, kaj kies nacia ortografio ne postulas apartajn literojn aŭ signetojn — devas esti skribataj kaj presataj *fonetike* kun ilia nacia ortografio en krampoj, aŭ *ortografie* kun la fonetika transdono en la krampoj. Ekzemple *Stivensn* (Stephenson), *Dekart* (Descartes), *Lejbnic* (Leibniz), *Ŝekspir* (Shakespeare) k. t. p.

2) Ĉiuj propraj nomoj, kiuj enhavas sonojn, ne ekzistantajn en la internacia lingvo, sed kies nacia ortografio povas esti transdonita per la esperantaj literoj, devas esti skribataj kaj presataj nur *laŭ ilia nacia ortografio*. Ekzemple *Montgolfier*, *Beaufront* k. t. p.

3) Ĉiuj propraj nomoj, kies nacia ortografio ne povas esti transdonita per helpo de la esperanta alfabeto, — devas esti skribataj kaj presataj *fonetike* kun ebla proksimeco al la nacia elparolado (ĉiuj rusaj nomoj, germanaj nomoj kun ä, ö, ü k. t. p.).

4) Ĉiu nomo, transdonita en la esperanta lingvo *fonetike*, kiel en la unua tiel ankaŭ en la tria okazo, devas esti presata per kursivaj literoj kaj en skribado devas esti substrekitaj.

La plenumado de tiuj ĉi reguloj estas tre facila, kaj se la varmaj partianoj de la fonetika aŭ ortografia skribado ne estas kontentigitaj — kion

fari! La afero de la vastigado de l' internacia lingvo estas antaŭ ĉio praktika afero kaj en ĝi oni devas ĉiam serĉadi la plej praktikan eliron el la malfacila situacio.

A. M. Arnold.

—❖—
Epigramo.

Naĝu kaj ne pensu pri danĝer'.
Vi ne dronos, estu certigita.
Ĉar ne dronas tiu en river'.
Kiu devas esti pendigita.

Amiko.

—❖—
Rimarkoj.

Poŝta kesto. Multaj naciaj gazetoj kaj ĵurnaloj havas apartan rubrikon, nomatan "poŝta kesto". Tie estas presataj titoloj de ĉiuj artikoloj, sendataj al la gazeto, kaj ankaŭ respondoj de la redakcio pri tio, ĉu sendata artikolo estos presata, aŭ ne. Tia "poŝta kesto" estas tre oportuna kaj utila por gazeto kaj ankaŭ por ĝiaj abonantoj. Unue, ĝi donas eblon konservi tempon kaj monon, kiujn la redakcio elspezas por poŝta respondo al ĉiu kunlaboranto, due ĝi donas al la gazeto novan kaj tre interesan rubrikon. Tial mi proponas al nia estimata Redakcio eble plej baldaŭ fari similan rubrikon en nia gazeto. Estus ankaŭ tre bone, ke la Redakcio en estonta, plej proksima numero de gazeto, presu titolojn de ĉiuj artikoloj, kiuj jam estas senditaj al la Redakcio kaj estos presitaj. Se la Redakcio farus tion ĉi, ĉiu kunlaboranto de la gazeto scius, pri kiuj objektoj jam estas skribitaj artikoloj kaj ne skribus pri tio, pri kio jam estas skribita.

Kion diras pri ni naciaj gazetoj kaj ĵurnaloj? En ĉiu numero de nia gazeto Redakcio sciigas nin, kiuj gazetoj kaj ĵurnaloj parolas pri ni, sed ĝi preskaŭ tute ne sciigas pri tio, kion nome ili parolas. Mi pensas, ke por niaj amikoj estus tre interese scii tion ĉi lastan. Estus tre bone, se la Redakcio farus en nia gazeto apartan rubrikon, kie estus presataj en lingvo internacia ĉiuj plej interesaj artikoloj de naciaj gazetoj kaj ĵurnaloj pri nia afero, favoraj artikoloj kaj ankaŭ malfavoraj. Por faciligi al Redakcio tiun ĉi aferon, ĉiuj artikoloj de naciaj gazetoj pri nia lingvo devas esti sendataj de niaj amikoj al Redakcio kun internacia traduko. Kompreneble, nur plej gravaj artikoloj devas esti presataj tutaj, ĉiuj ceteraj — parte. Mi pensas, ke tiu ĉi materialo por legado estus multe pli interesa, ol beletristiko, kiu estas nur vana balasto en nia gazeto, kaj kredeble estas legata de neniu*).


Anonco sur gazeta banderolo. Mi pensas, ke por nia afero estus utila, se sur ĉiu banderolo, en kiu estas sendata nia gazeto, estus presitaj per stampo en lingvo de abonanto sekvantaj vortoj: "lingvo internacia Esperanto". Tiu ĉi surskribo povus turni atenton al nia lingvo de tiuj homoj, kiuj (ekzemple poŝtaj servantoj) vidas la gazeton kaj ordinare ne scias, en kia lingvo ĝi estas skribita. Mi pensas, ke ni devas uzi ĉian oportunan okazon, por memori al la mondo pri ni kaj pri nia afero, prefere, se tiu ĉi memorigo nenion aŭ preskaŭ nenion kostos.

*) ??.

Pri portreto de s-ro Zamenhof. Pasis jam preskaŭ 4 jaroj post tiu tempo, kiam mi fariĝis esperantisto; tamen ĝis nun mi neniam vidis portreton de l' estimata aŭtoro de nia lingvo kaj neniel povis akiri ĝin, kvankam tre volus tion ĉi. Mi pensas, ke multaj el niaj amikoj havas tiun saman deziron. Tial mi petas la redakcion de nia gazeto kaj ĉiujn niajn amikojn pripensi tiun ĉi cirkonstancon. Ĉu ne povas la redakcio prepari kvankam plej malkaran fotografan portreton de s-ro Zamenhof kaj sendi ĝin al ĉiu deziranto. Mi pensas, ke tiu ĉi portreto estus tre baldaŭ disvendita, ĉar ĉiu esperantisto, sendube, rapidus ricevi por malgranda pago grandan plezuron.

Kion faras volapükistoj? Redakcio de nia gazeto promesis sciigi siajn abonantojn pri agado de volapükistoj kaj por tio ĉi eĉ aranĝis en gazeto apartan rubrikon sub nomo: "El mondo volapüka". Sed tiu ĉi rubriko ekzistis tre mallonge, kaj abonantoj de nia gazeto jam longe preskaŭ nenion scias pri tio, kion faras niaj samideanoj-volapükistoj, kaj kiel iras ilia afero. Mi pensas, ke por niaj amikoj tio ĉi estus tre interesa, kaj estus tre bone, se la redakcio renovigus siajn sciigojn pri agado de volapükistoj.*)

M. S. Rakitski.



Kiam ŝi ridetas.

(El H. Säterberg, sveda poeto.)

Ho, kiam ekridetas ŝi,
Belega estas ŝi en ĉarmoj.
Sed kiam ŝi el siaj larmoj
Ridetas ree — multe pli.

Slg. Ag.



"Memoras mi Viajn klarajn, bruligantajn okulojn."

(Rememoro el senfrukta pasinta vivo).

Ĉiafoje, kiam en mia memoro aperigas tiuj ĉi komencantaj vortoj de kanto, antaŭ miaj okuloj sin levas unu post alia pentraĵoj el mia pasinta vivo.

La granda ĝardeno sur alta bordo de rapida rivero. En la ombro de grandaj, multjaraj abioj kaj pinoj iras ŝi je mano kun mi. Niaj junaj koroj maltrankvile batadas kaj juna sango ruĝigas niajn vizaĝojn. Ŝi estas vestita je blanka vestaĵo; larĝa ruĝa rubando ĉirkaŭprenas ŝian gracian talion kaj ĵus deŝirita rozo egalmezure sin balancas en ŝia malgrandeta kunpremita maneto.

Ni iras trankvile, malrapide, silente... Ni sen vortoj komprenas unu alian...

Longe ni iris, fine ŝi sidiĝis pro laceco sur verdan, florantan herbaron kaj mallaŭte ekkantis per la agrabla voĉo:

"Memoras mi Viajn klarajn, bruligantajn okulojn"...

Mi, apogante min je pino, staris ĉe ŝiaj piedoj kaj kun neesprimebla ĝuo

*) En la lasta tempo ni ne aŭdis eĉ unu vorton pri aŭ de volapükistoj, nek alian signon de vivo. Tial ni nenion povas diri pri ili kaj iliaj agoj.

aŭskultis ŝin. Ŝi kantis tre bone kaj ŝajnis al mi, ke ŝian kantadon plezure aŭskultas kaj multjaraj abioj kaj la kovrita per diverskoloraj floroj herbaro kaj tuta naturo...

*

Malvarma vintro. La ventego kun kolero ĝemas sur korto kaj ploregas en la kamentubo. Sur korto mallumo, malvarmo... Sed en la vasta salono apude ŝi, mia kara knabino, — tre lume, tre varme...

Ŝi sidas apud mi je la fortepiano kaj kantas tre konatan al mi kanteton: "Memoras mi Viajn klarajn, bruligantajn okulojn"...

*

Pasis, nereveneble pasis la karaj horoj de mia juneco — kaj nun restis nur unu rememoro...

Unu fojo en la vintra vespero mi sidis malĝoja antaŭ brulanta kameno kun la gazeto en mano. La aro de pensoj kuris en mia kapo; kaj mi pense min transportis en ŝian malproksiman bienon, kie mi lasis ŝin por la duono de jaro.

Subite mi aŭdas frapadon en pordo... Malfermiĝas la pordo kaj enirinta poŝtisto donas al mi leteron, leteron de ŝi. Tiu ĉi letero estis unua kaj lasta ŝia letero al mi; en komenco de ĝi staris la vortojn de mia konata kanto.

"Memoras mi Viajn klarajn, bruligantajn okulojn" — — — — —

Nun mi — sen ŝi, sen la amo, sen vivo...


Senĝoje pasas nun mia vivo. Ofte sidadas mi longe ĉe mia skribtablo, kovrita per la dika tavolo de polvo kaj penseme rigardas folion de papero — ŝian leteron.

Unu post alia aperas en mia kapo pentraĵoj de la pasinta, perdita feliĉo kaj miaj lipoj senkonscie murmuretas:

"Memoras mi Viajn klarajn, bruligantajn okulojn"...

Tiun ĉi ŝian leteron mi konservas tre zorge — ĝi estas la sola rememoro pri ŝi — kun ĝi mi ankaŭ mortos...

I. Ŝirjaev.



Morgaŭ! Morgaŭ!

El "Versaĵoj en prozo" de I. S. Turgeniev.

Kiel malplena, velka kaj preskaŭ sensignifa estas ĉiu travivita tago! Kiel malsaĝe trakuris tiuj ĉi horoj post horoj!

Kaj, dume la homo volas ekzisti; li ŝatas la vivon; li esperas je ĝi, je si, je l' estonteco... Ho, kian feliĉon li atendas de la estonteco!

Sed kial do li ne imagas, ke la aliaj venontaj tagoj ne estas similaj al la travivitaj?


Tion ĉi li ne imagas. Li entute ne amas konsideri — kaj bone faras.

"Jen morgaŭ, morgaŭ!" — li sin konsolas, — ĝis tiu ĉi "morgaŭ" jetos lin en la tombon.

Kaj en la tombo oni devas ĉesi konsideri.

Majo 1879.

Trad. G. Slucki.



Adresaro de niaj abonantoj 1898.

Aŭstrujo-Hungarujo.

319. **Betegh Imre.** Fel-ör. *Csicsó-Keresztúr.* (Hungarujo.)
 282. **Hein, Richard,** reĝa imperia oficisto. *Feldsberg* (N.-Ö).
 295. **Koch, Josef.** *Oberaltstad* apud *Trautenau.* (Bohemujo.)
 294. Fraŭlino **Langer, Wilma.** N^o 15. *Göding.* (Moravujo.)

Belgujo.

350. **Agence de la Presse.** 34, Rue Emmanuel Hiel. *Bruxelles.*
 314. Fraŭlino **Greiner, Aug.** 102, Chaussée de Charleroi. *Bruxelles.*
 353. **Jamin, Jos.** 69, Rue des drapiers. *Bruxelles.*
 315. **Piron, Edmondo,** sekr. de la Klubo Esp. Gilly'a. *Gilly-lez-Charleroi.*

Brazilujo.

313. **Jacome Baggi de Araujo.** *Petropolis.* Etat de Rio Janeiro.

Bulgarujo.

321. **Načef,** leŭtenanto. *Vidin.*
 320. **Rakarof,** leŭtenanto. *Vidin.*
 342. **Popov, Hr.** *Dolna-Orehovitza.*

Finlandujo.

354. **Backman, A. Th.** Skolhusgatan 49. *Nikolaistad.*
 305. **Jadvojn, A. N.** 1:a baterio de Finlanda artileria regimento. Stacio *Kere.*

Francujo.

374. **Arduin, E.,** proprajulo de vinberejoj kaj negocisto. 11, Rue Turenne. *Bordeaux.*
 367. **Bel, Henri,** bibliotekisto de l'Universitato. *Montpellier* (Herault).
 310. **Charvin, J.,** principal clerco d'avoué. Rue Magnol. *Bonneville Haute-Savoie.*
 364. **d'Eyssantier, Edmond.** 123, Rue de Grenelle. *Paris.*
 366. **Jubin.** *Dainville par Arras* (Pas-de-Calais).
 371. **Lefort,** instituteur. *Compiègne* (Oise).
 368. **Lemaire, André.** 29, Rue Léger-Bertin. *Epernay* (Marne).
 362. **Lemaire, René.** 29, Rue Léger-Bertin. *Epernay* (Marne).
 368. **Lombard, Emile,** direktoro de "l'Etranger". 77, Rue Denfert-Rochereau. *Paris.*
 372. **Petitpierre, J.** 8, Boulevard du Nord. *Lyon* (Rhône).

(Daurigo.)

365. **de Peyredouille, A.** *Villeneuve-par-Blaye* (Gironde).

Islando.

355. **Jón Jónson.** Lakjargata 2. *Reykjavik.*

Japanujo.

316. **Welcome Society** (Kihinkwai). Imperial Hotel. *Tokio.*

Kanadujo.

370. **Solis, I.,** abato. Seminario de *St Hyacinthe.*

Nova Kaledonio.

369. **Bardoulet, E.** Administration pénitentiaire. *Nouméa.*

Portugalujo.

386. **P.e Luiz Teixeira dos Santos.** *Rezende.*

Rusujo.

343. **Albanus, H.** per adr.: S-ro B. Behr. *Reval.*
 296. **Bazilévskij, V. I.** Peterburgskaja Nabereĵnaja 38. *S. Peterburg.*
 360. **Bezin, Karl.** *Orenburg.*
 361. **Bezin, Osvald.** *Orenburg.*
 299. **Generalo Bjelajev.** 1:a gvardia-artileria brigado. *S. Peterburg.*
 348. **Biblioteko P. Makušin.** *Tomsk.*
 301. **Bolšakov, K. A.** *Šadrinsk.*
 306. **Dergint.** *Askin* (gub. Ufimskaja).
 340. **Barono fon Derŝaŭ,** inĝeniero. *Braĵansk* (gub. Orlovskaja).
 323. **Fedorov, Dmitri N.,** distancoestro. Stacio *Filonovo.*
 388. **Galkin, Aleks. Al.** *Vologda.*
 345. **Golub.** *Sukum-Kale.*
 312. **Grünfeld, A. M.,** stud. med. *Kišinev.*
 325. **Idelson, Alter.** *Nikolajev* (gub. de Ĥerson).
 359. **Iljin, Gavrielo Ivanovič.** Irinovska ĵeleznaja doroga, st. *Rĵabovo*; kontora imeniĵa, zemlemer(?). *S. Peterburg.*
 346. **Ivanov, Aleksandro,** intruisto en gimnazio. *Pskov.*
 322. **Kazmin, A. A.,** paca juĝisto. Staciona Filonovskaja, tra Stacio *Filonovo*, Sud-Orientaj fervojoj.
 308. **Kijanovski.** *Ŝostka* (gub. Ĉernigovskaja).
 349. **Koczur-Zyrardow, Teofil.** *St. Ruda-Guzovskaja.*
 356. **Levik, Julius.** *Berdičev* (gub. de Kiev).

298. Generalo **Makarov**. Soljanoj Gorodok. *S. Peterburg*.
303. **Minut**, leŭtenanto. Strato Kiroĉnaja. Gvardejskij sapernij batalion. *S. Peterburg*.
297. **Nobel**, L. L. Sampsonievskaja Naberejnaja 15. *S. Peterburg*.
337. **Pallasma**, A., kont. pism. rab. Ul. Serebrjanaja N:o 557. *Reval*.
307. **Pavlovskij**. *Ŝostka* (gub. Ĉernigovskaja).
302. **Pučkovskij**. *Kansk* (gub. Enisejskaja).
347. **Ŝmurlo**, Vladimir. *Tomsk*.
304. Princo **Teniŝev**, B. A., direktoro de l' Aleksandra lernejo. *Kremenĉug*.
358. S-rino **Wachowskaja**, A. K. Ul. Sobornaja N:o 18. *Sevastopol*.
337. **Valnev**, Al. Iv. *Ribinsk* (gub. Jaroslavskaja).
339. **Vinnickij**, Angulo de stratoj Kazanskaja kaj Goroĉovaja d, n-ro 26—27, loĝ. 52—53. *S. Peterburg*.
- Svedujo.**
318. Fraŭlino **Callerström**, Ida. *Päskalavik*.
341. **Ekholm**, Nils, fil. d-ro. Valhallavägen N:o 19. *Stockholm*.
373. **Ersson**, Anders. Bonäset. *Ström*.
324. **Etzel**, E. E., fil. kand. Torsgatan 11. *Uppsala*.
298. **Haglund**, Leonard. dentisto. *Kalmar*.
317. **Hartman**, C., instruisto popola. Sparrensgränd 10. *Karlskrona*.
351. **Holm**, Karl, poŝta oficisto. Sit Larsgatan 6. *Uppsala*.
352. **Nylén**, Paul. Svartbäcksgatan 11. *Uppsala*.
352. **Sandborg**, Alfred. Järnbrogatan 26. *Uppsala*.
344. **Stockholms Esperantoklubb**. *Stockholm*.
- Svisujo.**
335. **Monatliche Extrablätter**. *Samaden*.
- Unuigitaj Ŝtatoj Amerikaj.**
311. **French**, E. D. 204 W. 46th Street. *Newyork*.
257. **Geoghegan**, R. H. 906 North N. Street. *Tacoma*, Wash.
33. **Jaennicke**, Adolf. *Hagerstown*, Md.
284. **Smithsonian Institution**. *Washington*, D. C.
22. **Steckel**, Edward L. *Doylestown*, Penn.

Informejo de esperantistoj.

Korespondadi kun stenografistoj-esperantistoj de ĉiuj landoj deziras **J. Ŝivotovski**, Russie. Odessa. Maly per. N:o 1.

Korespondadi kun esperantistoj deziras s-ro **Greguar Slucki** en Elisavetgrad, Rusujo;
s-ro **Salomon Slucki**, Bolŝaja ulica, Elisavetgrad, Rusujo;
s-ro **Fiŝer** kaj s-ro **Ŝapiro** per la adreso de s-ro G. Slucki.

ANONCOJ.

La gazeton **Lingvo Internacia** oni abonas:

- en **Ameriko** ĉe R. Geoghegan, *Tacoma*, Washington, U. S. A.
- „ **Francujo** ĉe L. de Beaufront, *Epernay*, Marne.
- „ **Germanujo** ĉe W. H. Trompeter, *Schalke*, Westfalen.
- „ **Portugalujo** ĉe d-ro Costa e Almeida, *Rezende*.
- „ **Rusujo** ĉe V. Gernet, Jamskaja, 92, *Odessa*.

Ĉe tiuj ĉi sinjoroj oni mendas la gazeton kaj pagas al ili la abonpagon.

En aliaj landoj oni mendas la gazeton aŭ per la poŝto aŭ rekte ĉe la redakcio, adr. *Uppsala*. La monon oni plej bone alsendas per poŝta mandato.

Por Esperantistoj

la granda ĉiutaga belga gazeto **Le Petit Bleu** (en Bruxelles) malfermis apartan abonon de sia ĉiusemajna dimanĉa eldono, kiu ĉiam enhavas esperantan tekston kun franca traduko. La abonpago (rig. pĝ 53 de la aprila n-ro!) devas esti sendita al la Redakcio de "Le Petit Bleu", 17 Rue des Sables, Bruxelles.

L'Espérantiste

monata gazeto

publikigata en la franca kaj esperanta lingvoj

havas la celon propagandi Esperanton en la landoj uzantaj la lingvon francan kaj ĝenerale apud ĉiuj komprenantaj tiun ĉi lingvon. Per tekstoj kaj konsiloj specialaj, ĝi potence helpadas al la adeptoj pri la perfekta akiro de Esperanto.

Por ricevi *L'Espérantiste* oni povas: aŭ simple aboni ĝin (3 fr. en Francujo; 3 fr. 50 en la aliaj landoj) — aŭ fariĝi membro de la Societo por la propagando de Esperanto (4 fr. por jara enpago).

Sin turni al S-ro René Lemaire, sekretario de l' societo, en Epernay (Marne), Francujo.

Speciala instruado de

Librotenado

kaj komercaj kalkuloj

per korespondado en lingvoj: rusa kaj hebrea. La rekompenco estas tre modera. Prospektojn kaj provaĵn leterojn mi sendas al ĉiu, kiu sciigas min pri sia adreso.

Mia adreso estas:

Julius Levik, Berdiĉev (Rusujo).

Al atento de la rusaj esperantistoj.

Nova, perfekta, simpligita, tre facile ellernata metodo de Rusa Stenografio de J. A. Jivotovski en kvin leteraj lecionoj. La kondiĉojn kaj prospekton oni elsendas senpage.

Odessa, Maly per. N:o 1.

Al J. A. Jivotovski.

Per Esperanto.

Danke al Esperanto.

La Biblioteko de la lingvo internacia Esperanto

elsendis novan kajeron, enhavantan fol. 5 (duono) kaj 6 (duono). Tiu ĉi kajero prezentas la unuan akton de **Edziĝo de Figaro** aŭ **freneza tago**, kvinakta komedio de Beaumarchais, tradukita el la lingvo franca de A. Kofman sub la redakcio de L. de Beaufront.

En Rusujo, gub. de Nijnij-Novgorod, 40 verstojn de la rivero Volga,

oni vendas

7000 desatinojn da tero, en tiu nombro 8000 desatinojn da kverkaro, taŭga por ekspluatado. Kosto: unu miliono kvarcent miloj da rubloj. Por informoj oni sin turnu: Moskva, Mjasnickaja, Magazeno de semoj de Miĥ. Ivan. Fedorovski.

Enhavo de tiu ĉi numero.

	paĝo
<i>Esperanto kaj kongresoj internaciaj, kun alvoko de "Odesa Filio"</i>	81
<i>Novaĵoj</i>	86
<i>Rilate leteron de A. Z. de F. Postnikov</i>	88
<i>Internaciaj vojaĝoj de F. Postnikov</i>	88
<i>La kara nomo de K. (poemo)</i>	88
<i>Bibliografio de V. G.</i>	89
<i>El Lermontov de S. S., kun noto de A. Z.</i>	89
<i>El Nova Kaledonio de E. Bardoulet.</i>	90
<i>Pri traduko el la Sanktaj Skriboj de K. O. Svandem.</i>	91
<i>Jugataj bestoj de N. Sutkovoĵ</i>	92
<i>La najbaroj de V. Lastin (trad.)</i>	94
<i>Printempo (poemo) de D. Jegorov</i>	98
<i>Pola literaturo en Svedujo de A. Zakrjevski</i>	98
<i>Gramatikaj rimarkoj de L. de Beaufront.</i>	99

	paĝo
<i>Espero (poemo) de Amiko</i>	103
<i>Kvarlino (poemo) de Amiko</i>	103
<i>Aforismoj Buddhanaj de N. A. Borovko (trad.)</i>	104
<i>Ellaborado de nia lingvo de M. S. Rakitski</i>	104
<i>Ankoraŭ kelkaj vortoj pri la skribado de propraj nomoj de A. M. Arnold</i>	105
<i>Epigramo de Amiko</i>	107
<i>Rimarkoj de M. S. Rakitski</i>	107
<i>Kiam ŝi ridetas (poemo) de Sig. Ag.</i>	108
<i>"Memoras mi viajn klarajn, bruligantajn okulojn" de I. Sijjaen</i>	108
<i>Morgaŭ, morgaŭ! tradukis G. Slucki</i>	109
<i>Adresaro de niaj abonantoj 1898.</i>	110
<i>Informejo</i>	111
<i>Anoncoj</i>	111